

ESPERANTO



Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**UEA kaj
Konsilio de
Eŭropo**



***Al lingva
demokratio:
Simpoziaj
aktoj lanĉitaj***



**Statistiko:
Esperantistoj
vivas pli longe**



UEA: Hodlera ideo 90-jara

Vi trovos...

61 Malferme

Pensoj ĉe la statistiko

Osmo Buller

62 90 JAROJ DA PRAKTIKA SERVADO

William Auld pri la jubileanta UEA

"Ni tenu UEA forta ĝis eventuale ĝi ne plu estos necesa."



Fotografio de la 71-a UK

64 Azio

La unua en Afganio

Hejdar Raŝidi respondas al Keyhan Sayadpour

La verda stelo en japanaj liceoj

YAMASAKI Seikō

Ĉinio: For de frosto furioza

HANG Jun

Vjetnamio pensas pri Dua Azia

NGUYEN Thi Ngoc Lan

67



Fotografio de la 71-a UK

La membraro de UEA

ESPERANTO ALDONAS VIVJAROJN!

Ulrich Matthias

Statistiko pruvas: esperantistoj vivas pli!

68 Eksteraj rilatoj

UEA PREZENTIS "NAJBARON" AL KONSILIO DE EŬROPO

Hans Erasmus

UEA submetas propedeŭtikan projekton al la Konsilio.



Bild: Konsilio de Eŭropo

70 FORUMO

Usui Hiroyuki rezonas pri retorikoj, lingva ekologio kaj Esperanto.

71 REAGOJ


Kampanjo 2000

Estrarano Amri Wandel konsilas al fakaj asocioj.

72 RECENZOJ

M. van Oostendorp pri Al Lingva Demokratio.

E. Grimley Evans pri Vortkonsisto, vortfarado... R. Corsetti pri du libroj de CED. G. Cappa pri Mia pado. R. Jaderstrom pri ses svedaj titoloj.



75 LASTE APERIS

Kaj plue...

76 LOKE, FAKE

78 PERSONE

79 UEA-MEMBROJ EN '97

90 NEKROLOGOJ OFICIALA INFORMILO

La kovrilo: Homoj de ĉiuj specoj, kun unu sama lingvo...

Malferme: Ekskurso. Komplezo de Aŭstralia Turisma Buroo.

Adreso de la Centra Oficejo de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: +31-10-436-1044.

Telefakso: +31-10-436-1751.

Retpoŝto: uea@inter.nl.net.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Direktoro de la Centra Oficejo:

Pasquale Zapelli.

ESPERANTO

*Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)*

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: István Ertl.

Grafiko: Francisco L. Veuthey

Aperas en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino: la 10-a de ĉiu monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (NLG 66; USD 36; DEM 58; JPY 4300 ktp); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas 5,50 gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 2060, 1/2 p. 1150, 1/4 p. 630, 1/8 p. 350, 1/16 p. 190. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas double. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank MeesPierson, Postbus 749, 3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). Nederlanda poŝta ĝir-konto: 37 89 64 (Den Haag).

Kreditkartoj:



PENSOJ ĈE LA STATISTIKO

Bele ke jam 11 jarojn la individua membraro de UEA superas 7000. Sed... ni daŭre nur tretas duonvoje! Antaŭ 40 jaroj Ivo Lapenna fiksas 15 000 kiel la celon. Iu posta Estraro modestigis ĝin al 10 000, sed eĉ el trione rabatita celo triono persiste mankas.

UEA devas nepre kreski, ĉar ĝi devas iĝi pli forta, efika kaj utila. Krome, laŭ UEA eksteruloj mezuras la disvaston de Esperanto. Nur UEA diras kiom da membroj kaj revu-ricevantoj ĝi havas, kaj eĉ kiom da libroj ĝi vendas. Ĝi faras tion eĉ kiam la ciferoj falas. La publikeco de UEA estas io unika.

Lapenna fiksas realisman celon. Eblas duobligi la individuan membraron, ĉar fontoj ne mankas. Se ĉiuj kiuj membriĝas nur kiam ili kongresas, farus tion ankaŭ en aliaj jaroj, UEA havus 10 000 membrojn kaj pli ol 100 000 gld. da ekstraj rimedoj jare. Unubate oni solvus kiantajn problemojn kiuj pro manko de mono nin bremsas.

Kaj la 13 000 aligitaj membroj? Ne estos malfacile gajni 3000 el ili, se ni vere provos. Do, ni provu! Unue vekigu la perantojn. Tro multaj el ili peras kotizojn nur se ili venas. Peranto devas esti varbisto. Necesas ankaŭ forlasi la eksmodan sistemon de unu oficiala peranto en unu lando kaj liberigi la merkaton al ĉiuj kiuj pretas varbi kaj tiel eĉ iom enspezi.

Ju pli da kanaloj por kotizi, des pli granda UEA. Ni kreas kondiĉojn de kresko ankaŭ plibonigante niajn servojn. Ne sufiĉas ke tradicie ili jam estas multaj kaj iom bonkvalitaj. Ĉio devas fariĝi ankoraŭ pli bona. Sur unu kampo, TTT, ni eĉ hontinde postrestas.

Kiom ajn premas la manko de mono, multo eblas tuj, kiel ekz. plibonigi tiun ĉi revuon, la montro-fenestron kaj flagoŝipon de UEA. Jam nun ne povas vivi sen *Esperanto* tiu kiu atendas fidindajn informojn. Ni tamen volas doni al vi eĉ pli: modernan viglan prezenton kaj pli da paĝoj. Ni ankaŭ kalkulas ke pli bonaj revuo kaj aliaj servoj de UEA influas ekzemplodone tra la tuta movado. UEA estas la kerno de nia movado. En ĉio kion ĝi faras, ĝi devas konsideri la intereson de tiu tuto.

Komenciĝas la lasta jardeko de la unua jarcento de UEA. Ĉu post dek jaroj mi devos esperi ke neniu relegu miajn pensojn pri la ebloj de nia kresko? Tio dependas de vi. Guste vi povas plifortigi UEA! Komencu en via tuja proksimo kaj donacu ankaŭ al Fondaĵo Canuto por plenumi revon de fora samideano. Plifortigu vian asocion ankaŭ per aliaj donacoj; ili ebligis ke en 1997 UEA disdonis imponajn 160 000 gld. kiel subvenciojn kaj premiojn al organizaĵoj, Esperanto-centroj, unuopuloj ktp. UEA — t.e. vi — estas ne nur la kerno sed ankaŭ la plej granda mecenato de nia afero.

Osmo Buller



Hector
Hodler

90 jaroj da praktika

Tostante vivuon al la 90-jariĝanta Universala Esperanto-Asocio, William Auld konstatas revuante tiun preskaŭ-jarcenton ke la agadon de UEA ĉiam karakterizis praktikemo kaj atento al la bezonoj de la esperantistaro.

En la revuo *Esperanto*, numero 30, de la 1-a de majo 1908, aperis informo pri la fondo de Universala Esperanto-Asocio, okazinta je la 28-a de aprilo samjare [vd. marto, p. 41 —*Red.*]. Tio estas unu el la plej ŝlosilaj datoj en la historio de nia movado. Ĝi antaŭsignis la definitivan venkon de la praktikaj esperantistoj super la diletantismo, kiu en la formo de reformemo jam de dudek jaroj plagis kaj malhelpis nian movadon. Ne estas koincido, ke tiu fondo samtempis kun la Ido-krizo de 1907-1908.

“La tiutempa movado Esperantista, se oni rajtas paroli pri movado, havis ĉefe lokan karakteron. Ekzistis lokaj grupoj, kaj nur en dek tri regnoj tutlandaj societoj en formo de federacioj (dek en Eŭropo, tri transmare). Ne ekzistis tio, kion ni komprenas hodiaŭ sub praktika agado kaj servado. Esperanto estis en sia infanaĝo kaj ĵus havis gravan atakon de malsano, nome skismo pri teorio, kiu — febrsimile — skuis la tiaman fidelularon. Nekontesteble estas hodiaŭ, ke nia lingvo venkis tiun ĉi malsanon per simpla rimedo de natura metodo. Ĝi forpelis la idistajn kuracistojn, kiuj per nenecesaj ŝanĝoj kaj komplikaj volis ‘pliriĉigi’ la lingvon. Kaj ĝi aerumis sian propran ĉambron, enlasante freŝajn ideojn. Anstataŭ nura prediko kaj insisto pri tio, kio eblus, se Esperanto estus ĝenerala, oni provis starigi mem ion, kio helpos al la ĝeneraligo kaj sekve al la sanigo de l’ infano. UEA estas infano de la kriza tempo 1907-1908, kiam minacis la disfalo de jam ne multnombra adeptaro en grupoj kaj grupetoj de interdisputantaj teoriuloj”¹.

Praktikantoj kaj subtaksantoj

Zamenhof estis homo eminente praktika. Tion oni konstatas ekzemple pro la fakto, ke li zorge kreis lingvon senplue uzeblan jam de la unua tago, ĉar li aranĝis, ke ĉiu elemento havu unu fiksitan signifon. Tial necesis nur disponi pri ŝlosiloj kun tradukoj-klarigoj de la elementoj en aliaj lingvoj por tuj ekuzi skribe la lingvon. Sendube inter la fruaj pioniroj ankaŭ aliaj homoj volis praktike uzadi ĝin.

Sed bedaŭrinde tro multaj, diverskiale influaj, pioniroj taksis Esperanton certagrade ludilo, aŭ propono nur provizora kaj teoria. Ili ofte insistis nomi ĝin “helplingvo”, aŭ nura lasta rimedo kiam “realaj” lingvoj estus nesufiĉaj. Tiu subtakso estis rekte kontraŭa al la celo kaj praktiko de la lingvo internacia. Se atendi “definitivan” formon de Esperanto, ĝia uzado neniam komenciĝus (ĉe la reformistoj).

Estas ankaŭ klare, ke ĉe precipe okcident-eŭropaj eminentuloj la viva uzado de la lingvo iom lamis. Ni memoras, ke la ege aktiva kaj admirinda Carlo Bourlet skribis pri kunveno en oktobro 1902 honore al vizitanta ruso:



Reklam-bildkarto
el la brita
periodo de UEA



Petu prospekton kaj specimenan numeron de ESPERANTO
ĉe: Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo



**Théophile
Rousseau**

“Seleznjov estis nia parolinstruisto; ĉar li, la unua, konigis al ni, ke Esperanto povas esti parolata kun la samaj facileco, eleganteco, rapideco, kiel iu ajn nacia lingvo”².

Tio atestas, ke la parizanoj ĝis tiam ne parolis Esperanton facile, elegante kaj rapide! Feliĉe Seleznjov reprezentis la praktikan, malteorian flankon de la esperantistaro. Kaj li ne estis unika.

Théophile Rousseau, franco, kaj Hector Hodler, sviso, estis du el la esperantistoj, kiuj pli interesiĝis pri la praktika apliko de la lingvo kaj ĝia socia rolo. Jam en 1905 Rousseau klopodis por la apliko de Esperanto en turismo: li propagandis ĉe hoteletoj kaj instigis eldonadon de gvidfolioj kaj gvidlibroj. Kiam eksplodis la idista krizo, Hodler opiniis, ke neniu el ekstere (t.e. la “Delegacio”) rajtas trudi teoriaĵojn al uzantoj de la lingvo. Pro tio li dissendis, kun Rousseau kaj kelkaj aliaj, cirkuleron al la grupoj, kiu proponis starigon de internacia organizaĵo por servi al la lingvo-uzantoj. Kerna en tiu koncepto estis nomigo en laŭeble ĉiu urbo kaj vilaĝo de esperantista delegito, aŭ “konsulo” kiel oni komence nomis ilin, kiu pretus helpi al vojaĝantoj aŭ informserĉantaj esperantistoj. En marto 1908 pli ol cent grupoj aliĝis al la ideo kaj elektis delegiton. En aprilo la Asocio estis fondita.

La funkciado de UEA multe kontribuis al la fakto, ke Esperanto travivis la unuan mondmiliton. Ĝia centra oficejo estis en la neŭtrala Svislando, kaj tial la

oficistoj povis peradi informojn kaj transpagi monon, kiuj estis alivoje baritaj. La nombro de la helpopetoj kaj de la plenumitaj servoj estas konsterna. La traktitaj korespondaĵoj (alvenintaj kaj forsenditaj) sumiĝis je pli ol 175 000 dum la daŭro de la milito!


Ĝis hodiaŭ la delegita reto estas tre grava servo al la membraro. Sufiĉe ofte neesperantistoj diras al mi: “Sed kiel vi povas utiligi Esperanton? Se vi alvenos ekzemple en Rio-de-Ĵaneiro, ĉu vi povos interkompreni kun la homoj?” Estas facile prui al ili la eblecon ricevi helpon kaj kontaktojn pere de la loka delegito; tio surprizas kaj impresas ilin. Sen nia delegitaro, la situacio estus fundamente alia.

Krizoj kaj persekuto

Post tiu milito UEA, ĉefe pro financaj problemoj, trairis serion de organizaj krizoj, kiu kulminis en 1937 per splitiĝo en la asocio kaj la fondiĝo de Internacia Esperanto-Ligo (IEL, kun sidejo en Britio), al kiu aliĝis plimulto de la landaj asocioj (jam multnombraj tutmonde), certe la pli aktivaj inter ili. La krizon pliseverigis persekuto de la esperantistoj fare de faŝistaj k.a. reĝimoj. Tio denove malsukcesis detrui la esperantismon kaj ties movadon, kiuj triumfe renaskiĝis post la dua mondmilito.

Daŭre dum la mondmilitaj jaroj UEA kaj IEL klopodis havigi servojn al siaj membraroj. La revuoj (la oficialaj organoj de IEL estis *Heroldo de Esperanto* kaj la nove fondita *Esperanto Internacia*) diskonigis movadajn informojn, peris

☞ p. 66



**Ivo
Lapenna**



**Peter P. Wynants,
UEA-delegito
(1925-29) en
Nome, Alasko**



Fotografio de la 71-a UK. Centraj bildoj: Arkivo de UEA

La unua en Afganio

Precize antaŭ 20 jaroj (apr. '78, p. 85) ni aperigis korespondeton el Afganio: tio signis ekĝermon de malgranda, efemera afgana movado. Sed kio pri tiu korespondemulo, d-ro Hejdar Raŝidi, hodiaŭ? Keyhan Sayadpour lin intervjuis en Irano.

Afganio estas lando suferanta de jardekoj pro milito, daŭraj bataĵoj kaj malriĉeco. Tamen, eĉ en tia dezerto la semoj de nia lingvo povas kreski. Atestas pri tio la

UEA, por informiĝi pri la movado. Mia letero aperis en *Esperanto*, kaj UEA poste rigardis min kiel la fondinton de la E-movado en Afganio.

Kio estas via profesio?

Mi estas kuracisto. Mi studis en la medicina fakultato de Kabulo kaj specialiĝis pri radiologio en la ŝtata radiologia instituto de Moskvo. Mi nun laboras kiel ĝenerala kuracisto.

Kiel la militoj en Afganio trafis vin?

Kiam la komunistoj atakis mian landon, mi ricevis multajn leterojn el ĉiuj flankoj de la mondo, en kiuj samideanoj demandis pri la situacio en mia lando. En la militoj mi perdis miajn du fratojn, kaj pro la danĝeroj mi rifuĝis al Irano en 1981. Post tri monatoj mi ricevis permeson loĝi en la lando.

Kiel vi aktivas en la Esperanto-movado?

Omaĝe al la centjara jubileo de Esperanto, mi verkis kaj mem eldonis ilustritan lernolibron porperslingvanoj. Restas eldonotaj mia Esperanto-

lernolibro en la paŝtua

lingvo, mia dari-lingva Esperanto-gramatiko, kaj esperantlingve: *La vivo de Mohameto*, *Islama mondkoncepto*, *Islamaj preĝoj* kaj aŭtobiografio. Proksimume 20 artikoloj miaj aperis en revuoj kiel *Medicina Internacia Revuo*, *Ŝiraza Espero* kaj *IREJO-bulteno*.

Ĉu ekzistas ankoraŭ aliaj afganaj esperantistoj?

Kiam mi vivis en Afganio, mi instruis la lingvon al kelkaj samlandanoj, interalie al la tiam 16-jara geniulo Sejed Ĝalal. Bedaŭrinde, nuntempe mi nenion scias pri ilia sorto.

Intervjuis Keyhan Sayadpour



D-ro Hejdar Raŝidi

unua afgana esperantisto, la 77-jara d-ro Hejdar Raŝidi, kiu nun loĝas en la irana urbeto Torbat-e-Jam (proksime al la limo de Afganio) kaj aktivas en la irana movado.

Kiel vi lernis Esperanton?

Antaŭ dudek jaroj, kiam mi loĝis en Afganio, mi legis artikolon pri Esperanto en perslingva revuo. Tuj mi sendis leteron al prof. Saheb-Zamani, petante lin sendi al mi lernomaterialojn. Post unu monato da lernado mi sukcesis skribi E-lingvan leteron al

Klaso 3 de la 3-a jaro, municipa mezlernejo de Sapporo, Tonden Centra.

LA VERDA STELO

Varsovio sub la nazia okupado. Kelkaj maljuna pastro. Unu infano ŝtele elstarigi verdan standardon sur ruino

Li revenas akompanate de germana soldato — kiu montriĝas esperantisto. Tiu epizodo facile asociiĝas kun renoma foto de T. Pleskaczyński: verda standardo flirtas sur ruino de la Zamenhofa domo en Varsovio.

Sed temas pri la intrigo de unu el la teatraĵoj plej popularaj en la mezlernejoj de Japanio: *Sub la verda stelo*. Jam la titolo divenigas ke temas pri Esperanto. Fakte, la aŭtoro OKA Kazuta (1903-86), aktiva en la antaŭmilita proleta infanliteraturo, estis esperantisto. La temo — samideano inter la okupaciantoj — povus esti paŭsita sur iom simila okazintaĵo en Ĉeĥio (kiu siavice elvokas la ĉeston de la germana kapitano Neubarth ĉe la dumilita enterigo de Zamenhof — ho, eleganto de l' malnova mondo!).

La dramo de Oka fascinas generaciojn da lernejoj. Sole en la lastaj jaroj estis raportitaj kvin prezentadoj en 1996/97 (la lernojaro daŭras de aprilo ĝis marto en Japanio), kaj jam kvin en 1997/98, kun atendo de pliaj.

En Japanio, Esperanto estis pli aŭ malpli vaste konata antaŭ la milito, pli frue pro la efemera burĝonado de demokratio en la 20-aj jaroj, poste pro la laborista E-movado sub la japanstila faŝismo. Postmilita, la plej uzata lernolibro de la japana entenis legaĵojn pri Zamenhof, dank' al *kanamoz*-isto (advokato de abolicio de la ĉina ideografio kaj ekskluziva uzo de kanaoj) MATUSAKA Tadanori, E-



N JAPANAJ LICEOJ

aj georfoj vivas ĉe preĝejo kun
ras nokte, spite de fajro-kovro, por
de la strato Dzikia.

simpatianto en la redakcio. Kiam la lingva politiko de la ŝtato reakciigis, tiu teksto estis forigita. Sekve, mezaĝaj japanoj scias pri Esperanto, dum pli junaj malkleras pri ĝi. Iom kompensas tion lastatempa apero de leciono pri Esperanto en liceaj lernolibroj de la angla. (En Japanio multas e-istoj inter la instruistoj de la angla, kaj pluraj profesoroj pri ĝi radikale akuzas la anglalingvan imperiismon.)

Alia informfonto pri nia lingvo estas tiu ĉi teatraĵo de Oka, trovebla en volumaro de lerneaj dramoj. Por aŭtuno, sezono de lerneaj festivaloj, lernejoj elektas temon por prezentado, iuj el ili teatraĵon. Japana E-Instituto estas tiam inundata de iliaj informpetoj. De multaj jaroj ni havas preta kompletan por ili, inkluzive diskon de *La Espero* kaj indikojn pri la proporcioj de la verdstela flago. Ĉiu lernejo kiu ricevas la materiaĵojn kaj surscenigas la teatraĵon, nepre sendas al ni kolektivan leteron.

Supozeble neniu lernejo serioze eklernas Esperanton, sed tio ne gravas. Nia movado, diference de aliaj, postulas studon, neordinaran mensostreĉon. Esperantistigas nur superintoj de tiu rezisto. Tamen, gravas ke la socia medio estu ne malamika al nia lingvo. Tiuj kiujn tuŝis la spirito de esperantismo formas la bezonatan socian atmosferon por la prospero de la Esperanta kulturo.

YAMASAKI Seikō (Japanio)

Ĉinio: For de frosto furioza

Ĉenvendado, ĉineskaj poemoj, kuracaj manĝaĵoj — jen nur kelkaj temoj de la tre riĉenhava Tutlanda Konferenco de Esperanta Kulturo (11-14 dec., Conghua, Kantono).

Unuafoje Honkongo sendis delegacion (ses-membran) al enlanda kunveno esperantista en Ĉinio. 102 pliaj gesamideanoj el la tuta lando, de Interna Mongolio ĝis Yunnan, partoprenis la konferencon inter ĉarme ridaj floroj kaj prospere verdaj arboj de la sudo, kontraste al la furioza vintra frosto de norda Ĉinio.

La faka programo pruviĝis tre diversa. En sia kunveno Ĉina Medicina E-Asocio planis baldaŭan eldonon de trilingva vortaro pri tradiciaj medicino kaj farmacio ĉinaj, de vortaro pri ĉin-medicinaj vegetaĵoj kaj de faklibro pri tradiciaj kurac-efikaj manĝaĵoj. Ĉina Fervojista E-ista Asocio, kiu presis kolekton el 70 disertaĵoj de siaj membroj, decidis sendi delegitojn al la

jubilea, 50-a kongreso de Internacia Fervojista E-Federacio. Serio da fakaj kunsidoj traktis temojn “Esperanto kaj...”: Esperanto kaj ekonomio, turismo, ĉenvendado, eldonado, ĉina kulturo, instruado...

Ekspozicioj montris i.a. la atingojn de la juna handikapita poeto MAO Zifu, poemojn kaj fotojn de LU Jixin, kaj la historion de la E-movado en Zhongshan (provinco Guangdong).

Alvenis ne malpli ol 64 disertaĵoj pri la kvin konferencaj temoj, inter kiuj estis “la 21-a jarcento kaj la ĉina E-movado”, “tradukado kaj esplorado de la ĉina literaturo”, kaj “25 jaroj da ĉinesko en Esperanto”.

Laŭ raporto de HANG Jun (Esperanto-sekcio de Ĉina Radio Internacia)

Membroj de Hanoja Esperanto-Klubo



Vjetnamio pensas pri Dua Azia

Hanoja Esperanto-Klubo (HANESPE) kunvenis en 1997 kvin fojojn. La tria kunsido en junio estis filmita de la nacia televido. Kelkaj klubanoj kaj lernantoj estis intervjuitaj, vidiĝis Esperantaj libroj kaj gazetoj, fotoj pri la kluba agado. Klubanoj partoprenis la fond-kunsidon (20 junio) de Hanoja Esperanto-Asocio. El la 25 Esperanto-kursoj organizitaj de HANESPE ekde 1992 ĝis nun, 12 okazis en 1997. Ĉar renkontoj kun alilandaj esperantistoj estas tre maloftaj, ĉiuj malnovaj klubanoj klopodas perfektigi sian lingvoscion per ĉiusemajna parolpraktikado, por kontribui al la sukceso de la Dua Azia Esperanto-Kongreso, okazonta en Vjetnamio en aŭgusto 1999.

NGUYEN Thi Ngoc Lan, ĉefestrarano de HANESPE



INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO

19-26.07.98 Kecskemét, Hungario

Alĝilo kaj pliaj informoj: Dávid Alko Golden, Damjanich u. 1/c.
I. 8, HU-8200 Veszprém, Hungario; rete: goldend@math.bme.hu

☞ (Daŭrigo de p. 63)

petojn, raportis pri la universalaj kaj aliaj kongresoj (la Universalaj Kongresoj tamen ne okazis inter Berno, Svislando, 1939 kaj Berno, Svislando, 1947). Aliaj gravaj servoj koncernis librovendadon, reklamon, turismon kaj aliajn. Per tio ankaŭ la baza spirito de la fondintoj de UEA mirinde povis travivi la novan mondmiliton. Kvankam la sidejo de IEL estis en lando neneŭtrala, Britio ne estis invadita, kaj la kampara situo de la Ligo signifis, ke ĝi evitis la bombojn.

En 1947 eniris la ekvacion nova faktoro. Tio estis la persono de Ivo Lapenna. Ĉe la Berna kongreso lia diplomatia genio sukcesis unuigi la du asociojn sub la egido de IEL, sed kun la nomo UEA kaj la oficiala revuo *Esperanto*: tiel nia tradicio estis konservita. Li ankaŭ emfazis la esperantismon, kaj akceptigis difinon de la neŭtraleco, kiu ordigis rilatojn inter la esperantistoj en la militintaj landoj. Mi estas sufiĉe aĝa por memori, kiom grava estis tio, se la movado esperis energie flori denove.

Kaj ĝi floris. Post la kongreso Ivo Lapenna plenumis varbvojaĝon tra la landoj de okcidenta Eŭropo, sukcese instigante la lokajn grupojn (aŭ ties restaĵojn) repreni viglan Esperantan laboron. Li organizis translokigon de la asocia sidloko el la brita kamparo al “grava urbo en grava vigla eŭropa centro”, t.e. Roterdamo; kaj insistis pri stabiligo de la financoj. Tie UEA povis plifortigi kaj plimultigi la servojn, kiuj estis esenca pravigo de la asocio mem. Ekzemple, li kreis la postenon de Konstanta Kongresa Sekre-

tario, kies tasko estas kunlabori kun lokaj organizoj en preparado de la UK-oj. Prave oni rigardas tiujn kongresojn kiel unuecigajn faktorojn de la movada kulturo.

Monda organizaĵo por diasporo

Laŭ mia opinio UEA estas nemalhavebla. Kompreneble ekzistas aliaj internaciaj esperantistaj organizaĵoj, kiel ekzemple SAT, sed tiuj estas fundamente specialistaj aŭ fakaj. UEA estas federacio de landaj asocioj — kiuj, ne mirinde, estas parohecaj (pli aŭ malpli). En landa asocio oni tro facile povas forgesi pri la tutmondeco de la lingvo. La fakta diasporo de la esperantistoj nepre bezonas mondan organizaĵon, kie koncentriĝu kaj simboliĝu tiu kulturo, kiu estas la spino de la esperantismo. Ĝi kunordigu la internacian agadon. Kiel en 1908, ĝi servu al la membraro. Gravas ĝia biblioteko kaj la registrado (kaj vendado) de laŭeble ĉiuj novaj eldonaĵoj. Gravas ĝia mono-perado. Gravas ĝia organizado de la Universalaj Kongresoj. Gravas ĝiaj operaciaj rilatoj kun Unesko kaj ĝia reprezentiĝo ĉe aliaj neesperantistaj organizaĵoj.

Manko de UEA eble ne komplete detruus la lingvon, ĉar Esperanto vivos dum ekzistos homoj ĝin bezonantaj — homoj, kiuj ne kontentiĝas per piĝina balbutado de unu-du fremdaj lingvoj. Sed oni ne povas imagi la pasintajn 90 jarojn en la movado sen la nerompebla fadeno (ne rompita de militoj aŭ despotaj diktatoroj) de nia tutmonda organizaĵo. Ni salutu ĝin hodiaŭ, kaj ni tenu ĝin forta ĝis eventuale ĝi ne plu estos necesa pro la universala akcepto kaj uzado de Esperanto!

William Auld

NOTOJ: 1. Hans Jakob. *Universala Esperanto-Asocio 1908-1933: Historia skizo*. Ĝenevo, 1933.
2. *Monumento de Carlo Bourlet*. Rio de Janeiro, 1940.

UEA 90-jara!

MALFERMA TAGO EN LA CENTRA OFICEJO

sabaton la 25-an de aprilo 1998 (10h00 - 17h00)

★ Prelegoj pri tri granduloj de UEA:

Hector Hodler (Mark Fettes)
Edmond Privat (Ed Borsboom)
Ivo Lapenna (Ulrich Lins)

★ La tuta estraro de UEA ĉeestos

★ La libroservo rabatos ĉion je 10%!


- ★ Specialaj ofertoj
- ★ Bazaro de esperantaĵoj
- ★ Loterio
- ★ Kafo kaj teo senpagaj



BANKEDO je 100-metra alto en Euromast favore al Kampanjo 2000 (18h00). Prezo: 125gld.

Bv. antaŭmendi ĉe la CO antaŭ la 10-a de aprilo.

☞ Se vi deziros tranokti en Roterdamo, la CO volonte peros por vi hotelĉambron.



Esperanto aldonas vivjarojn!

La aŭtoro, asekura matematikisto, studis la ciferojn pri la dumviva-membraro de UEA. Lia konkludo interesos ne nur statistikistojn kaj kotiz-kolektantojn.

Estas vaste konate ke en la okcidentaj (kaj eble ankaŭ en la eks-socialismaj) landoj ekzistas relative multaj maljunaj, parte eĉ maljunegaj esperantistoj. Tio povas havi diversajn kialojn. Mi povis ekzameni unu el tiuj eblaj kialoj surbaze de statistikaj donitaĵoj, kiujn mi ricevis de la CO de UEA. Temas pri la demando ĉu esperantistoj vivas pli longe ol averaĝaj homoj.

Por ekzameni tiun ĉi demandon, mi kalkulis surbaze de la laŭaĝa distribuo de la dumvivaj membroj (DM) de UEA la atendeblan nombron de la mortoj inter la DM-aro por la jaroj 1989 ĝis 1996 kaj komparis ĝin kun la efektiva nombro de la DM forpasintaj en tiu periodo. La mortoprobablojn¹ mi ĉerpis el la t.n. "Heubeck-mortotabeloj" (1983), kiuj ne plu bone taŭgas por prognozi vivodaŭrojn, sed kiuj laŭ esploroj ankoraŭ liveras la realajn nuntempajn mortoprobablojn de germanaj maljunuloj.

Mi kalkulis ke, surbaze de tiuj ĉi premisoj, la averaĝa mortoprobablo de la nuntempaj DM de UEA (889 en feb. 1998) estas 4,04%. Se ni supozas ke antaŭ 9 jaroj la tiamaj DM estis averaĝe du jarojn pli junaj ol nun, kaj ke krom tiu diferenco la laŭaĝa distribuo estis esence la sama kiel nun, ni povas konkludi ke en 1989 la averaĝa mortoprobablo estis 3,24%. Oni devus sekve atendi ke en 1989,

kiam UEA havis (jarkomence) 955 DM, ĉ. 31 el ili forpasos. Simile en 1996, kiam UEA nombris 898 DM, oni atendus ĉ. 35 mortojn. Sume, de 1989 ĝis 1996 estus 267 mortintoj.

Sed laŭ statistiko de UEA en tiuj ok jaroj forpasis "nur" 208 DM, do 22,1% malpli ol atendite. Tiu ĉi kalkulo montras ke kun granda certeco (nivelo de signifikeco: ĉ. 99,99%) DM de UEA vivas pli longe ol averaĝaj germanoj. Kvankam eblas imagi ke unuavice sanaj homoj fariĝas DM, oni rajtas supozi ke ankaŭ esperantistoj ĝenerale vivas pli longe ol averaĝaj germanoj.

La ĉi-supra kalkulo eliras el la supozo ke la laŭaĝa distribuo de tiuj 157 DM kies aĝon UEA ne konas, estas la sama kiel tiu de la 732 aliaj. Sed se oni konsideras ke unuavice TEJO-membroj devas indiki sian naskiĝdaton ĉe sia aliĝo, oni povas konjekti ke tiuj ĉi 157 membroj estas averaĝe pli aĝaj ol supozite, tiel ke oni rajtus atendi eĉ pli da forpasoj. Aliflanke la ĉi-supraj kalkuloj estas faritaj por viroj, dum la certa procentaĵo de virinoj inter la DM povas iom malplialtigi la atendeblan nombron de mortoj (ĉar ĝis 95-jara aĝo la mortoprobabloj de virinoj mal-superas tiun de viroj). Fine necesas diskuti ĉu la mortoprobabloj en Germanio taŭgas por la komparo. Laŭ mi jes, ĉar la pesita averaĝo² de la vivodaŭroj en la landoj kie

loĝas la DM (preskaŭ sen-escepte en la t.n. unua mondo), certe ne multe diferencas de tiu en Germanio.

Kvankam necesas ankoraŭ pli detale ekzameni la statistikajn donitaĵojn kaj la premisojn sur kiuj baziĝas la ĉi-supraj kalkuloj, mi ne dubas ke ĝustas la konkludo: esperantistoj vivas pli longe. Oni povas elpensi multajn klariigojn por tio: Esperanto estas

tute sendanĝera hobbio, kiu povas doni al homoj la senton ke ilia vivo havas sencon. Kaj eble tiuj homoj kiuj laboras por efektiviĝi la belan sonĝon de l' homaro, klopodas — pli ol aliaj — ankaŭ fari ĉion por ke ilia propra revo pri sano kaj longa vivo povu realigi.

Ulrich Matthias (Germanio)

NOTOJ

1. la probablo morti en la koncerna aĝo
2. meznumero konsideranta ankaŭ la oftecon de la diversaj valoroj (ĉi tie: la nombron de la dumvivaj membroj en la respektivaj landoj)

Jaro	Nombro DM jarkomence	Morto- probablo	Atendebla mortonombro	Efektivaj mortoj
1989	955	3,24%	31	22
1990	959	3,33%	32	13
1991	961	3,42%	33	23
1992	961	3,51%	34	24
1993	955	3,60%	34	50
1994	920	3,68%	34	31
1995	906	3,77%	34	24
1996	898	3,86%	35	21
1997	896	3,95%	35*	24*
1998	889	4,04%	36*	—*
*) ne en la sumo				
Sumo 1989-1996:			267	208
Diferenco de atendeblaj kaj efektivaj mortoj: -22,1%				

UEA prezentis “Najbaron

UEA estas en konsultaj rilatoj kun Konsilio de Eŭropo (KdE), ĉe kiu ĝin reprezentas Hans Erasmus (Nederlando) kaj André Ruyschaert (Luksemburgio). Erasmus regule partoprenas en la Strasburga KdE-sidejo la kunsidojn de neregistaraj organizaĵoj. Post tri jaroj da lobiado KdE akceptis la propedeŭtikan projekton NEIGHBOUR.

Konsilio de Eŭropo (KdE) estas la plej malnova politika eŭropa organizaĵo, fondita en Londono la 5-an de majo 1949. Membrigiĝis tiam 10 ŝtatoj. Hodiaŭ KdE konsistas el 40 membroŝtatoj kun 800 milionoj da loĝantoj. (Eŭropa Unio havas 15 membroŝtatojn.) La celoj de KdE estas:

- defendi la homajn rajtojn, la parlamentan demokration kaj certigi la superecon de la juro;

- starigi konvenciojn je eŭropa nivelo celante harmoniigi la socian kaj juran praktikon de la membroŝtatoj;

- favori la konsciiĝon pri eŭropa identeco surbaze de komunaj valoroj.

Post 1989 (la falo de la fera kurteno) la plej gravaj misioj estas:

1. esti politika ankro kaj gardanto de homaj rajtoj;

2. helpi la ŝtatojn en meza kaj orienta Eŭropo al realigo de reformoj politikaj, juraj kaj konstituciaj samtempe kun reformoj ekonomiaj;

3. havigi konon pri homaj rajtoj, loka demokratio, edukado, kulturo kaj vivmedio.

Kion KdE atingis?

Ĉirkaŭ 165 konvencioj aŭ traktatoj jure validaj temas pri homaj rajtoj, batalo kontraŭ krimado, prevento de torturado, pri kunlaboro en edukado ktp. (Ni revenos al la KdE-agadoj

rilate instruadon de lingvoj.) Krome KdE lanĉis rekomendojn pri diversaj temoj kiel sano, medio, edukado, kulturo kaj sporto.

Grava estas la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj kaj Fundamentaj Liberecoj (1950), kiu kreis ellaboritan sistemon de kontrolo kaj protektado de homaj rajtoj. Tiurilate la konvencio starigis du organojn: la Komisionon kaj la Eŭropan Kortumon pri Homaj Rajtoj. Por pli efika protektado de la homaj rajtoj, la pintkunsido de Vieno en 1993 decidis anstataŭigi ambaŭ per unueca kaj konstanta Kortumo.

Ne eblas menciigi ĉiujn agadkampojn, sed ni nomu almenaŭ la Eŭropan Kulturkonvencion pri edukado, kulturo, junularo kaj sporto, kaj la gravan Konvencion pri la Protektado de Naciaj Minoritatoj, kiu specifikas la principojn respektendajn de la ŝtatoj: egaleco, religio, *lingvo* kaj tradicioj, kultura disvolviĝo kaj konservo de identeco, aliro al la amaskomuniloj, starigo de kontaktoj liberaj kaj pacaj inter homoj dividitaj de landlimoj, uzado de ŝildoj kaj indikiloj en lingvoj minoritataj.

Pintkunsido pri valoroj

La 10-11-an de okt. 1997 la prezidantoj kaj ĉefministroj el la 40 membroŝtatoj kunvenis en Strasburgo por



Bildo: Konsilio de Eŭropo

FAME: Premio al Boulton, helpo al Kortrijk

FAME-Fondaĵo transdonos la 6-an Esperanto-kulturpremion de Aalen al d-rino Marjorie Boulton en solena matineo, dimanĉon la 26-an de aprilo en la urba biblioteko de Aalen (Germanio). Paroladon omaĝan al Boulton prezentos alia fama esperantista poeto, la islandano Baldur Ragnarsson. Laŭ koncerna kontrakto, FAME disponigos la premion, kaj la urbo



Marjorie Boulton

Foto: Simon Chapman

aranĝos la matineon en la domo Torhaus, kie troviĝas ankaŭ la biblioteko de Germana Esperanto-Instituto. La matineon — al kiu krom esperantistoj estas invititaj precipe aŭtoritatoj kaj eminentuloj de la publika vivo — akompanos ekspozicio kun verkoj de Boulton.

FAME-Fondaĵo krome ĵus decidis kontribui per du trionoj de la kostoj, per 3000 germanaj markoj, al la savado de eminenta kolekto de precipe E-periodaĵoj, la biblioteko de Fondaĵo Vanbiervliet en Kortrijk (Belgio, vd. marto, p. 58).

Stefan Maul, prezidanto de FAME

n'al Konsilio de Eŭropo

la kultura kaj natura heredaĵo eŭropa kaj la deziron stimuli komprenon inter la homoj de nordo kaj de sudo, interalie edukante junulojn al civitaneco kaj instigante iniciatojn por akceli reciprokecan respekton kaj solidarecon inter la popoloj.

Strukturo de Konsilio de Eŭropo

La ĉefaj organoj de Konsilio de Eŭropo estas:

- Komitato de 40 ministroj pri eksteraj aferoj aŭ ties konstantaj reprezentantoj (kiuj estas ambasadoroj kun sidejo en Strasburgo);
- Asembleo de 572 parlamentanoj el la parlamentoj de la 40 membroŝtatoj;
- Konstanta Konferenco de lokaj kaj regionaj aŭtoritatoj;
- Sekretariejo (1200 oficistoj), nuntempe gvidata de Daniel Tarschys (iam lerninta Esperanton, vd. intervjuon en jan. '95, p. 2)

La kvin paraĝrafoj de la plano temas pri: demokratio kaj homaj rajtoj; socia kuntenigo; sekureco por civitanoj; demokratiaj valoroj kaj kultura diverseco; strukturoj kaj labormetodoj.

Neregistaraj organizaĵoj (NRO-j)

Nuntempe UEA estas unu el la ĉirkaŭ 400 organizaĵoj kiuj kunlaboras kun KdE. Kvankam la influo de la NRO-j ne estas komparebla kun tiu de la ĉefaj organoj de KdE, ilia pozicio tute ne estas malforta: ili havas statuson de konsilanto. Tiun statuson ĝuas nur tiuj internaciaj NRO-j kiuj reprezentas specifan terenon kaj kontribuas al la atingo de la celoj de KdE. La celoj de la Esperanto-movado — laŭ la statuto de UEA — signife kongruas kun tiuj de KdE: fakte, preskaŭ ĉiujn celojn de la Esperanto-movado alstrebas ankaŭ KdE, kun la escepto, evidente, de la disvastigo de Esperanto. Ekzistas ekzemploj kiuj montras ke la Konsilio aŭskultis rekomendojn de NRO-j kaj agis konforme al ili.

Tiel KdE profitas ne nur de kontribuoj de reprezentantoj de la oficialaj organoj, sed ankaŭ de la dinamiko de la socio. La kontribuoj de NRO-j povas konsisti el:

- prezentado de dokumentoj dum konferencoj, seminarioj;
- prezentado de dokumentoj al komisionoj de registaraj spertuloj aŭ de parlamenta asembleo;

— partopreno kiel observanto aŭ plenrajta partoprenanto, kaj kontribuado al agadoj en diversaj kampanjoj.

La pozicio de NRO-j estas fiksita en rezolucio de la Komitato de Ministroj (Rezolucio [93] 38 pri rilatoj inter KdE kaj NRO-j de 18-10-1993).

NEIGHBOUR

KdE respondecas pri diversaj projektoj pri instruado en lernejoj, kunlaboro inter universitatoj, pedagogia esploro, kaj lingvolernado kaj -instruado. En 1997 okazis konferenco pri lingvoinstruado, kie mi prezentis la projekton NEIGHBOUR*, tiel atentigante KdE pri la propedeŭtika valoro de Esperanto. Jen unua paŝo. Ni ne forgesu ke KdE dum pli ol 20 jaroj sekvis tute alian vojon: plibonigi lernometodojn por fremdaj lingvoj. Multaj lernolibroj estis publikigitaj. Konata titolo estas "Sojlo" en diversaj lingvoj, kiu enkondukas tuj en la ĉiutagajn lingvon kaj vivon de iu lando. La lernocelo estas atingi komunikadon je minimuma nivelo, kaj la celgrupoj estas turistoj, migrantoj, laboristoj ktp. KdE jam antaŭ longe elektis tiun specifan vojon por lingvoinstruado. Estas malfacile ŝanĝi la opiniojn de KdE-oficistoj, de reprezentantoj de eduk-ministerioj kaj de aliaj edukspertuloj. La plej simpla vojo, kiu ne postulas opini-ŝanĝojn de KdE, estas realigi eksperimenton aŭ projekton pri la propedeŭtika valoro de Esperanto: la projekton NEIGHBOUR.

Grava temo de KdE kaj de Eŭropa Unio estas plibonigo de la rilatoj inter la landoj ambaŭflanke de Mediteraneo. KdE demandis la NRO-jn ĉu ili povas kontribui al la realigo de tiu celo. UEA prezentis la projekton NEIGHBOUR kiel eksperimenton por plibonigi kaj rapidigi la komunikadon, faciligi la interkulturajn interŝanĝojn. Post tri jaroj da lobiado NEIGHBOUR estis akceptita de KdE kadre de ties projekto Mediteraneo.

Hans Erasmus (Nederlando)

*Anglalingva akronimo de "Nova eduka iniciato garantianta heterogenecon kaj dulingvismon, respektante universalajn regulojn"

rekonfirmi la politikajn valorojn de KdE. La kunsido produktis finan deklaron kaj planon, konfirmante interalie la celon atingi pli grandan unuecon inter la membroŝtatoj por konstrui socion pli liberan, tolereman kaj justan, bazitan sur komune rekonataj valoroj kiel la libereco de opini-esprimado kaj de informado, la kultura diverseco kaj la samvaloreco de ĉiuj homoj. La pintkunsido ankaŭ substreki la gravecon de protektado de



De venkemo al kuntenado



Famas la trilingvisma formulo (loka dialekto por la loka, nacia lingvo por la ŝtata, Esperanto por la internacia bezono) per kiu Lapenna proponis solvi la mondan lingvo-diversecon, “unu el la plej gravaj obstakloj... por la internacia kooperado”¹. Tiubilde gravas la koncepto de Esperanto kiel la internacia lingvo, kies ekskluziva statuso en la terenoj internaciaj venku la obstaklan diversecon lingvan.

Efikis siatempe tiu ĉi venke ekskluzivema retoriko, ĉar neniuj lingvoj pretendis similan statuson problem-venkan. La angla jam fortiĝadis, sed eĉ en la 50-aj jaroj “ajna ideo pri la angla kiel vera tutmonda lingvo estis nur obskura, ombra, teoria eblo”², ne laste ĉar dum la malvarma milito sovetianoj neniel rekonis ekskluzivecon de la angla, kiel ajn pragmate ili ĝin uzis.

Intertempe tamen falis la socialisma bloko, venkis la “libera” okcidento, venkis ankaŭ la angla. Nun nenio baras tiun ĉi lingvon eksportiĝi ĉien sur la terglobo kaj pretendi sian rolon kiel la ekskluzivema venkanto de la monda lingvo-problemo.

Fatala situacio por la venkema retoriko de Esperanto. La iam alloga ideo ke per la ekskluziva funkciado de Esperanto oni venku Babelon, nun aspektas kiel nura paŭsado de la realaĵo, en kiu tiun rolon jam plenumas alia lingvo: la angla. Antaŭ tiu ĉi potenca realaĵo vane sonas la protesto ke ni havas pli bonan solvon, kiun la mondo adoptu. Ĉu do ni eble kaptulacu al la angla kaj kabau?

Ne — aŭ almenaŭ mi ne aliĝas al tia defetismo. Eblas ja koncepti alternativan rolon por Esperanto, kiu tiel saviĝu samtempe kaj de la defetismo kaj de la tradicia retoriko de venkemo, ironie generinta la defetismon. Ni

dubu la mondrigardon mem kiu neprigas la venkon super la lingva diverseco rigardante ĉi tiun “obstaklo”. Mi pensas ke el tia dubemo estiĝas nova, alternativa rolo por Esperanto.

La venkema stilo de pensado fakte samtempe kun la ekformiĝo de modernaj ŝtatoj, kiel prave rimarkigas Fettes³. Laŭ li moderna administrado de ŝtato antaŭsupozas modelon unulingvan, kaj do strebis/-as al la venko super la diverseco lingva. Sed ne nur ne okazis kompleta venko super tiu diverseco; pli kaj pli montriĝis maltaŭga rilati al lingvaj aferoj per tia venkema pensmaniero, ĉar persistas la lokaj identecoj, ankaŭ la lingvaj, kaj pri iliaj valoroj oni (re)konsciiĝas.

Aliflanke, tamen, ja fortas ankaŭ la diverseco-venkema tajdo, kiel vidigas

la preskaŭa triumfo de la angla. Sed des pli gravas en nia hodiaŭo problemigi ajnan venkemon, kiu provas doni al iu specifa lingvo (eĉ se Esperanto mem!) statuson ekskluzivan: tio minacas la ekologion de identecoj, i.a. tiun de lingva diverseco, kiun la Manifesto de Prago taksas “konstanta kaj nemalhavebla fonto de riĉeco” — kontraste al la Lapenna-tempuloj, por kiuj ĝi estis nura obstaklo.

Laŭ mi tio signalas ke Esperanto laŭgrade forlasu la ĝisnunan ekzistostilon kaj transiru al nova, alternativa funkcio: tiu de ekvilibrigilo en la lingva ekologio, en kiu diversaj lingvoj lernu kunteni sin, ne plu provante venki unuj la aliajn. Sed eble eĉ ne temas pri io tute nova: ankaŭ Fettes sugestas ke Zamenhof siatempe sentis bezonon gardi la ekvilibron kontraŭ la invadanta moderniga tajdo kaj kreis Esperanton.

USUI Hiroyuki (Japanio)

El la revuo Riveroj

NOTOJ

1. El la teksto de la peticia kampanjo de UEA, transdonita al UN en 1966. En: *Esperanto en perspektivo*. Rotterdam: UEA-CED: 1974, p. 779.
2. Crystal, David: *English as a global language* (“La angla kiel tutmonda lingvo”). Cambridge: University Press, 1997. p. VII.
3. *Esperanto*, nov. 1997, p. 182-184.

AKADEMIO DE ESPERANTO

Akademianoj ĝis la jaro 2007

La balot-kontrolo pri la lastaj akademijaj elektoj okazis la 1-an de marto. Por 15 naŭjaraj lokoj (1998-2007) kaj 2 trijaraj (1998-2001) prezentiĝis 28 kandidatoj. El la 42 voĉdonrajtaj akademianoj 35 partoprenis en la sekreta baloto. Jen la nomoj de la elektitoj, vicigitaj laŭ la nombro de la ricevita voĉoj. Asterisko signas novajn akademianojn.

Christer Kiselman — 29	Sergej Kuznecov* — 25	Brian Moon* — 22
Geraldo Mattos — 28	Spomenka Štimec* — 24	Baldur Ragnarsson — 22
Jouko Lindstedt* — 27	Edwin de Kock — 23	Renato Corsetti* — 21
Werner Bormann — 26	Andrzej Petryn — 23	François Lo Jacomo — 21
Ilona Koutny* — 26	Gerrit Berveling — 22	Stefan Maul* — 21

Laŭ voĉnombro sekvas kiel 16. kaj 17., kaj tial por 3 jaroj estas elektitaj:

Jorge Camacho — 19

Aldo de' Giorgi — 19

(Tamen, konstatinte malkreskon de la apogoj kompare al sia lasta elekto, de' Giorgi anoncis sian demision.)

Ne elektois la kandidatoj (asterisko indikas ĝisnunajn akademianojn): André Albault* (17 voĉoj), Ignat Bociort (17), Simo Milojević* (16), Gonçalo Neves* (16), Reinhard Haupenthal* (15), Mauro Nervi (14), Wim De Smet (9), Antonio Alonso Núñez (8), Tomasz Chmielik (8), Jacques Le Puil (8) kaj Nicolino Rossi (7).

La renovigo de la estraro okazos per aparta voĉdono en majo.

Reagoj



Respondo pri Heroldo

La letero de s-ro Fighiera en via revuo (feb. '98, p. 36) enhavas asertojn kiuj misinformas la legantaron. Tial mi afable petas vin aperigi ĉi tiun respondon, kun adekvata reliefo.

Unue, por ke ne estu miskompreno, la gazeton *Heroldo de Esperanto* posedas kaj administras la koooperativo de Literatura Foiro, LF-koop. *HdE* estas registrita ĉe la kompetenta svisa instanco, sub ISSN-n-ro 0018-0823. Subskribante kiel "prezidanto de la leĝe registrita societo sen profita celo 'Heroldo de Esperanto'", s-ro Fighiera donas falsan impreson al viaj legantoj, kvazaŭ li daŭre estus posedanto de nia periodaĵo kaj daŭre havus la rajton esprimi sin en la nomo de *HdE*. Kiel ĉiuj scias, okazis transpreno de unu posedanto al nova.

Kiam okazas transpreno, ankaŭ okazas ŝanĝoj, ĉu plaĉaj ĉu malplaĉaj: tio estas afero de persona gusto. La nuna *HdE*, eĉ se tio malplezurigas s-ron Fighiera, ne povas esti fotokopio de la antaŭa. Mia-krede, la principoj kiuj gvidis *HdE* de la komenco estas respektataj, nun eĉ pli firme ol antaŭe.

Mi ne volas ĉi tie komenti aŭ argumentadi pri la diversaj alineoj de la menciita letero de s-ro Fighiera, escepte de ĉi tiu, vere elvokiva pri la maniero kiel ĵonglas la aŭtoro kun la realeco, kiam li asertas ke: "tial mi de longe ĉesis kunlabori kun la novaj redaktoroj". Li ne povis ĉesi, simple ĉar li neniam komencis: la redakcio de *HdE* ne petis (nek petos) lian kunlaboron. En la transpreno de la gazeto estis nur unu klaŭzo pri kunlaboro, sed pure administra:

nome s-ro Fighiera prizorgos la adresaron kaj la abonpagojn maksimume ĝis la fino de 1997. Tion li plenumis fakte ĝis septembro 1997, kaj li estis oportune dankita.

Konklude mi ŝatus, por ke ĉesu tia polemiko pri supertendenceco kaj sendependeco, rememorigi ke la gvidlinio de la nuna redakcio de *HdE* klare situas en la ĉefartikolo de n-ro 1:1997, el kiu mi citas: *Al neniun partio Heroldo devas obei, krom tiu de vero kaj honesto. Neniun aŭtoritaton Heroldo bezonas agnoski, super sia abonantaro. [...] Kaj ni klopodos esti dignaj je tio, des pli ke la juĝo de la abonantaro estas pli severa ol tiu de kiu ajn asembleo.* Kaj ĝis nun, estu certaj, la abonantaro ne mal-kreskis.

Marc Hiltbrand
Prezidanto de LF-koop

Red.: Ĉar debato pri iu periodaĵo devus preferi okazi sur la paĝoj de tiu sama, ni disponigis la reagojn alvenintajn pri ĉi tiu temo al la redakcio de *Heroldo de Esperanto*, kaj post la publikigo de ĉi tiu repliko ni konsideras ke la debato en nia revuo estas finita.

KAMPANJO 2000

Tri fakaj celoj

Kion signifas la celoj de Kampanjo 2000 por la fakaj asocioj? Estrarano Amri Wandel respondas.

La unuan celon — levi la organizan kaj idean nivelon — ĉiu faka asocio provu atingi per interna aktiviĝo: pli bona kunligo de membroj, pli efika varbado de novuloj, lanĉo — aŭ plibonigo — de propra bulteno.

La dua celo — plialtigo de la prestiĝo de Esperanto ĉe eksteruloj — povas esti atingata per kreo de kontaktoj kun internaciaj organizaĵoj agantaj en parencaj fakoj kaj profesiaj specialiĝoj, ekzemple kun neregistaraj organizaĵoj (NRO-j) ĉe Unesko. Sukcesaj ekzemploj de tia agado estas la kontaktoj inter Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj du NRO-j rilataj al universitata instruado, Internacia Asocio de Universitatoj (IAU) kaj IAU-PL (vd. majo '97, p. 85, kaj ĉi-sekve), same kiel la atingoj de Esperanta PEN-Centro sine de Internacia PEN.

La tria celo estas pli ambicia: influi la internacian vivon, ĉiu en sia sfero. Tio eblas nur se oni per informado kreas reputacion por siaj organizaĵoj kaj agado en la koncerna medio. Por fakaj asocioj ebla komenco en tiu direkto estas ligi kontaktojn kun samtemaj aŭ teme proksimaj internaciaj organizaĵoj.

AIS ekzemplas internacie

Ni montru per konkreta ekzemplo la realan atingopovon de ĉi tiaj iniciatoj.

AIS sendis aliĝpeton al IAU. Plenrajta membreco ne montriĝis ebla, ĉar AIS ne plenumas la formalajn akceptokriteriojn de IAU: laŭ ĉi tiu, AIS agas plie kiel reto de universitatoj ol mem proponante plentempajn studprogramojn. Tamen, IAU sugestis peti "asocian membrecon", kian havas ekz. universitataj asocioj internaciaj kaj regionaj.


Tiu respondo neniel estas negativa. Fakte, IAU konsideras la ligan de filioj kunigatan de AIS samnivela kun ekz. la svisa rektora konferenco aŭ la organizaĵo de la afrikaj universitatoj. IAU ne aludis al eventuala neseriozeco aŭ mageraj laborrezultoj, nur al struktura stabileco. Rilate la prestiĝon de AIS kaj de Esperanto, plena kaj asocia membreco apenaŭ diferencas: Esperanto ambaŭkaze aperas oficiale kiel internacia komunikilo en asocio apartenanta al la internacia asocio de universitatoj.

Menciindas ke, kvankam UEA (ne akademia organizaĵo) ne povas oficiale ligiĝi al IAU, ekde 1997 ĝi havas kun tiu reciprokajn informkontaktojn. Mi pritraktis kun Eva Egron-Pollack, IAU-direktorino pri kunlaboro, pluan kunagadon: ekz. eblus informadi pri Internacia Kongresa Universitato per la bulteno de IAU, sciigi pere de IAU la kongreslandajn universitatojn pri la IKU kaj inviti al ĝi ties funkciojn.

Amri Wandel

Estrarano pri faka kaj scienca agado

Recenzoj



Kiom nuda estas la reĝo?


Al lingva demokratio. Towards Linguistic Democracy. Vers la démocratie linguistique. Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj. Prago, 20-23 julio 1996. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. 22,50 gld.

Ĉu la infano en la Andersena fabelo parolis Esperante kiam ĝi vidis ke lia reĝa moŝto promenas nuda tra la urbo? La reĝo ja pensis ke li surhavas bele ornamitan veston, kiu estu nevidebla nur por nekompetentuloj. Kaj ĉar neniu homo deziras esti nekompetenta, ĉiuj silentis — escepte de la infano.

Verŝajne la infano uzis sian nacian lingvon kiam li naive eldiris la veron. Laŭ la fabelo, ĉiuj ĉeestantoj ja tuj komprenis lin. Tamen allogas la komparo inter la esperantistaro kaj tiu fabela infano: daŭre iradas lia reĝa moŝto, fiera pri sia belega robo kudrita de interpretistoj kaj tradukistoj. Nur nekompetentuloj travidas la roban belon, kaj Esperanto estas infanaĵo.

Bedaŭrinde en la mondo eksterfabela la ĉeestantoj ne tuj agnoskas la veron kiam oni elkrias ĝin. Ne multe da homoj pretas senargumente akcepti ke reĝo nudas. La esperantistoj do devas daŭre diskutadi, argumentadi, klarigadi, komprenigadi, kaj eble plej grave: aŭskultadi. Almenaŭ kelkaj neesperantistoj ja pripensis sian pozicion, dum ni aliflanke ne povas ekskludi ke tiu ulo reĝa tamen surhavas T-ĉemizeton.

Ĉi tiu libro donas bonegan ekzemplon de tia bonkvalita diskutado. Ĝi estas resumo de la Nitobe-simpozio kiun UEA organizis antaŭ du jaroj en



Prago, dum la tiea UK. Ni do trovas en la libro kontribuojn de kelkaj el la plej interesaj nuntempaj ideologiantoj de la E-movado (Deguchi, Erasmus, Fettes, Frank, Kobayashi, La Torre, Lee, Lins, Selten, Tonkin) kaj de ekstermovadaj politikistoj, oficistoj kaj scienculoj (Busdachin, Cestac,

Dupuis, Peeters, Phillipson, Pirmoradi, Poth, de Saint Robert, Skutnabb-Kangas, Wynne Jones). Krom tio en la libro troviĝas ankaŭ resumoj de diskutoj, en kiuj partoprenis, krom la ĵus menciitaj, i.a. Blanke, Huzimoto, Moon kaj De Smet.

La plej multaj kontribuajoj kaj diskutoj estas altnivelaj kaj traktas ĉiajn praktikajn kaj teoriajn demandojn pri la internacia lingva politiko. Interesa aspekto estas ke multe da neesperantistaj kontribuantoj taksas la estontecon de Esperanto almenaŭ tiel optimisme kiel la movadanoj. Oni ja povus kritiki tiun aspekton de la libro: kial oni ne trovas ankaŭ iom pli da kritikemaj voĉoj? Sed aliflanke, kompreneble, bezoniĝas antaŭ ĉio la freŝa rigardo de simpatiantaj eksteruloj.

La etoso de la konferenco verŝajne estis tre entuziasma. Profesoro Phillipson el Danlando diris en la konkludaj komentoj ke “estas malfacile trovi ie ajn en la mondo ĉirkaŭ cent homojn kiuj diskutas lingvan politikon dum varmaga somertago je ĉi tiu nokta horo. Tio estas nekredeble impresa por homoj kiuj laboris sur la kampo de lingvoinstruado, lingvopolitiko kaj kiuj provas analizi lingvan justecon. [...] Mi persone sentas ke mi definitive transpaŝis al nova kompreno pri la signifo de Esperanto en internacia komunikado.” Ankaŭ la leganton de la libro kaptos tia entuziasmo, probable eĉ se tiu leganto ne estas esperantlingva: ĉiuj kontribuajoj estas presitaj en la origina lingvo (do angle, france aŭ Esperante). Krom tio, la libro enhavas resumojn de ĉiuj prelegoj en ĉiuj tri lingvoj.

La plej tuŝa ero de la volumo por mi estas la (anglalingva) raporto de NITOBÉ Inazô, asista ĝenerala sekretario de Ligo de Nacioj, kiu vizitis la 13-an UK en Prago (1921) kaj raportis pri siaj spertoj al la Ligo. Estas tre ĝuste kaj tre ĝojige ke UEA honoris tiun simpatian kaj seriozan homon donante lian nomon al la simpozio. La raporto havas vere mirinde honestan kaj koncizan tonon. Ni povas nur bedaŭri ke tia raporto havis tiom malgrandan efikon sisteme.

Ho, la leganto pensas: se nur pli da internaciaj altranguloj havus tian akran vidon; se nur pli da homoj eldirus en tia simpla sed konciza stilo ke la tradukista robo de la reĝo tamen ne estas tiel bone videbla!

Marc van Oostendorp (Nederlando)

LIBRO DE AMO

“Leganto, se vi estas pruda
Kaj naŭzas vin la amo nuda ...”

... tiam nepre ne aĉetu ĉi tiun faman majstroverkon de la Esperanta erotika poezio, kiu malkovris al tiom da geesperantistoj la misteron kaj belon de sekso.

Peter Peneter kaj Georgo Peterido Peneter. Byblos: Je la ŝildanongo de “L’Akacio”, 1969. 262p. 20cm. Enhavas la senpudoran *Sekretaj sonetoj* (1931) k.a. Prezo: 21,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Malprecizaj revortumoj ne valoras

Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo. André Cherpillod (1930). Courgenard: la aŭtoro, 1996. 55p. 15,00 gld.

La vortfaraj teorioj de Esperanto — nepre bezonas reviziadon — skribis Jouko Lindstedt en recenzo pri *Plena Analiza Gramatiko* (PAG) en *Planlingvistiko* (6 [1983], p. 7-14). Tiujn teoriojn komencis René de Saussure en 1910, klarigante la ŝajnan malsimetron inter *kombil/kombilo* kaj *brosi/broso*. PAG pufigis la teorion al komplika doktrino kun terminoj kiel *pseŭdopleonasma*, *inversa vortefiko*, *disfalaj flankelementoj*. Bertil Wengnergren reduktis ĝin denove al ĝia esenco, per sia multe pli klara prezo en *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko* (PMEG) [ĝis nun legebla nur en TTT: <http://purl.oclc.org/NET/pmeg> — Red.]. Tamen la centra dogmo, “kunmetismo”, ne tuŝiĝis. Ĉu Cherpillod proponas novan aliron? Bedaŭrinde, tute ne. Ĉi tiu broŝuro nur ripetas la enhavon de PAG, aldonante nenion novan.

Jen ni legas denove pri la “gramatika karaktero de la radikoj”, difinita jen intuicie, jen per aŭtoritato (la Fun-



damento aŭ listo de la Akademio), kaj ofte tre malklare, ekzemple ĉe *vest-*, *gut-*, *lum-*, *redundanc-*. Ŝajne Cherpillod mem konfuziĝas, ĉar li uzas *vesto* (p. 16) kiel ekzemplon de -o post

verba radiko, kaj sur la sekva paĝo li enlistigas *vesti* kiel ekzemplon de -i post substantiva radiko!

Jen ni legas ke *rikoltomaŝino* estas “maŝino de rikolto” (p. 21); supozeble *broŝmaŝino* estas “maŝino de broso”, kaj *broŝema* estas “ema je broso”, same kiel *parolema* estas “ema je parolo” (p. 22). Jen *belulo* estas “belo kiu estas ulo” (p. 31), kaj jen *portebla* iĝas malkristale malklara per la sen-senca formulo “eblo (taŭga) je porto” (p. 31). Tiaj malprecizaj revortumoj ne multe valoras, eĉ kiam ili estas pli kredindaj ol la ekzemploj ĵus donitaj: oni devus eksplicite analizi la signifojn de vortoj kaj ne nur traduki ilin al esprimoj same malklaraj.

Ne estas klare kiajn legantojn celas la broŝuro. Tiuj kiuj deziras praktikan kaj kompreneblan klarigon pri vortfarado, preferus la koncernajn ĉapitrojn en PMEG, kaj interesatoj pri la gramatika tradicio legos en PAG. Rilate kritikon de tiu tradicio mi invitas la interesatojn rigardi la malmultajn referencojn kiujn mi trovis, okupiĝante mem pri vortfarado: <http://www.cl.cam.ac.uk/users/etg10/vortfarado.html/>.

Edmund Grimley Evans (Britio)

La favoro de usonaj profesoroj

Aspects of Internationalism — Language & Culture. Red. Ian M. Richmond. 1993. 151p. 60,00 gld. **Language Status in the Post-Cold-War Era.** Red. Kurt E. Müller. 1996. 152p. 78,00 gld. Ambaŭ: Lanham/New York/London — Rotterdam/Hartford: University Press of America/CED. 24cm. Bind.

Enhaven kiel eble plej malsimilaj, ĉi tiuj du libroj montras la du vizaĝojn de la laboro de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED).

La unua kolekto de kontribuoj, malgraŭ la iom ĝenerala titolo, pritraktas pure kaj nure Esperanton. Tio tamen neniel indikas banalecon. La libro malfermiĝas per kontraŭ-Esperanta kontribuo de Saul Levin, kiu ne prezentas la kutimajn riproĉojn (oni ne povas verki poemojn en artefarita lingvo, nek esprimi siajn sentojn en nenatura lingvo ktp); akceptinte ke Esperanto estas lingvo inter la lingvoj, li tamen demandas al si pli-malpli: kial diable normala homo interesiĝu pri lingvo kiun neniu parolas? La postaj kontribuoj provas doni nerekantan respondon, pritraktante precipe la literaturajn valorojn de Esperanto,

originale kaj traduke. Tre interesaj estas la pensoj de I. M. Richmond pri la leganto de Esperanto-verkoj, kiu laŭdifine kutime ne apartenas al la sama lingva kaj kultura medio kiel la verkanto, kaj pri la multaj problemoj kiujn tiu situacio kreas por la aŭtoro. Ĉi tiu eseo estas rekomendinda al legantoj de la angla lingvo kiuj interesiĝas pri literaturaj problemoj. (Sep paĝoj da Esperantaj resumoj en si mem ne pravigas aĉeton de la libro.)

La dua libro havas tute alian temaron, socilingvistikan kaj lingvopolitikan, kun aparta atento al tio kio okazis kaj okazas ĉe Unuiĝintaj Nacioj. La kontribuintoj verkis tre alt-nivele kaj en stilo ne nur interesa sed ankaŭ rekte amuza. Mia edzino, kiu ĝenerale ne povas ne oscedi antaŭ tekstoj pri lingvopolitiko, ja ŝtelis de mi la libron kaj legis ĝin, “ĉar ĝi estas amuza”!

Pluraj kontribuoj pritraktas la rolon de la rusa lingvo kaj historie kaj en la nuntempo. Joshua Fishman donas pli larĝan teoriantan perspektivon de lingvaj situacioj enlande kaj interlande kaj komparas la prilingvaj sintenojn de diversaj imperioj, komencante per la persa (tre tolerema, laŭ raporto en la Biblio). Humphrey Tonkin resumas la provojn proponi Esperanton ĉe UN kaj analizas la nunan situacion kaj la ŝancojn kiujn ĝi prezentas. Flanka temo rilatas al la ebleco utiligi Esperanton en la usona lerneja sistemo por doni al la infanoj pli mondan alrigardon. Mi devas diri ke, malgraŭ la boneco de la prezentitaj tezoj, akceptigi tion al usonaj gepatroj kaj lernejaraj direktoroj certe estas kolosa laboro.

Post la legado de la du libroj vortumiĝas demando en mia kapo: Kial oni havas en Usono tiom da universitataj profesoroj favoraj al Esperanto, malgraŭ ke nia lingvo certe ne estas pli disvastiĝinta en la usona socio ol en pluraj aliaj landoj? Fenomeno vere rimarkinda, pri kiu denove atestas ĉi tiuj du titoloj.

Renato Corsetti (Italio)

Vasta spiralo da kompetentoj

Mia pado. Gerrit Berveling (1944). Chapecó: Fonto, 1997. 311p. 21cm. 52,80 gld.

Aro da tekstoj malsamtemaj, malsamstilaj, malsamĝenraj, verkitaj en diversaj epokoj, ĉe kiu tamen oni sentas la ruĝan fadenon de interna kohereco. Tio povas esti, por kredanto, taŭga priskribo de la Biblio. Ĝi bone adaptiĝas ankaŭ al la libro *Mia pado*, en kiu Berveling kolektis eseojn, rakontojn, poemojn, artikolojn kaj prelegojn, verkitajn en jarcentkvarono da esperantisteco. Cetere, la Biblion oni tre ofte renkontas en tiuj ĉi paĝoj, ĉar ĝi situas centre inter la multifacetaj intereso de la aŭtoro. Ĉar krom klerulo, instruisto, redaktoro de la literatura revuo *Fonto* kaj akademiano de Esperanto, Berveling ankaŭ estas pastoro de la remonstranta eklezio, negranda liberal-kristana komunumo, kiu konsideras religiajn dogmojn ne tro gravaj aferoj — ĝia

slogano estas “Unueco en la neceso, Libereco en la necerta, en ĉio la Amo”.



Antaŭ deko da jaroj, Gerrit Berveling pozis jene kun sia filino Etelka por la kovrilo de la revuo *Fonto*.

Ĉirkaŭ la varma kerno de sia kredo en “Dio JHVH”, Berveling dismetas vastan spiralon da kompetentoj: filo-

logia, lingvistika, literatura, ĵurnalisma, inter aliaj. Kvankam predikoj kaj teologiaj eseoj konsistigas la ĉefan parton de *Mia pado*, la afabla voĉo de la aŭtoro sukcesas informi kaj klerigi ankaŭ leganton kiu ne kapablas partopreni lian kredon. Politike maldekstrema, Berveling pasie verkas favore

al la rajto por samseksemuloj elekti sian propran vivon ankaŭ kadre de eklezio, aŭ al la neceso eviti novajn militojn en kiu ajn parto de la mondo. Atenta observanto de siaj kunhomoj, en siaj noveloj li senteme skizas vivsituaĵojn kaj homportretojn.

La disaj eroj de *Mia pado* jam aperis antaŭe en revuoj: ĉefe *Monato*, *Dia Regno* kaj *Evangeliaj Kajeroj*. Memoraĵoj kaj kelkajn poemojn Berveling tiris el jam eldonitaj libroj, tiel donante al tiu ĉi kolekto la kroman valoron de persona antologio. Laŭ la vidpunkto de esperantisto-leganto, tiu ĉi libro fortigas la konstaton ke nia lingvo vere taŭgas por ĉiuj aferoj de la kulturo kaj de la vivo.

Giulio Cappa (Italio)

Anstataŭ lerni la svedan

Tradukoj de Sten Johansson: La beleco de Merab (1983). Torgny Lindgren. 1995. 80p. 12,60 gld. **En la realo troviĝas truo. Nuntempa sveda novelarto** (1986-94). 1996. 84p. 12,60 gld. **La kiso kaj dek tri aliaj noveloj** (1894-1924). Hjalmar Söderberg. 1995. 56p. 10,50 gld. **Nobela novelaro. Sep noveloj de tri svedaj nobelpremiitoj** (1919-1934). Pär Lagerkvist, Eyvind Johnson, Harry Martinson. 1995. 60p. 10,50 gld.

Tradukoj de Bertil Nilsson: Mariamne (1967). Pär Lagerkvist. 1995. 56p. 10,50 gld. **La orpantalono.** Laŭ Max Lundgren. 1996. 40p. 8,40 gld.

Ĉiuj titoloj: el la sveda. Skövde: Al-fab-et-o. 21cm.

Ĉi tiu recenzanto iam klopodis studi perlibre la svedan, la lingvon de siaj patroflankaj familianoj antaŭ du-tri generacioj. Li ne sukcesis multon regi. Anstataŭe, li bonvenigas la Esperantan ŝancon frandi verkojn el la sveda lingvo: ses titolojn de deko da aŭtoroj, plejparte novelojn, el pli-malpli la pasintaj cent jaroj.

La homoj kaj lokoj aperantaj en la rakontoj estas plejparte svedaj. La temoj ĝenerale spegulas la vivon de la ĉiutago. Predike religia instruo enplektiĝas en *La beleco de Merab*, dum ni gustumas magian realismon pere de *En la realo*...

Kiel kompari la du tradukintojn? Plej facilas la tasko se oni ekzamenas tradukojn el la sama aŭtoro — ĉi-kaze Lagerkvist. En *Nobela novelaro* ni trovas “Patro kaj mi” (1924) kaj “La postulema gasto” (1919), kiujn tradukis Johansson. La romaneton *Mariamne* (1967) prilaboris Nilsson.


“Patro kaj mi” estas karakterizata de rapidflua multvorteco. Temas pri knabo iranta kun la patro tra la kamparo, ŝajne distrocele. Timiga estas la mondo de la infano, male de tiu de la patro. “La postulema gasto” preskaŭ tuj impresas Kafkeca, James-eca. Denove kreiĝas sento de rapideco, sed

ankaŭ de haoso, nerealo, urĝa serĉado de ekzistokialoj.

Alispeca estas *Mariamne*, kies protagonisto estis amata de reĝo Herodo en la tempo tuj antaŭ la naskiĝo de Kristo. Ĝi akiris dumtempan kapablon moligi la sintenon de tiu senkompato, tiel savante la vivojn de multaj siaj hebreaj kunnacianoj. Tiu kapablo efikis nur dum ŝia kurtigita vivo; poste riveliĝis ke la tirano fakte ne fundamente ŝanĝiĝis. Ĉi tie la lingvo kaj stilo estas pli simpla. Kvankam troviĝas multvortaj frazoj, kiel en “La postulema gasto”, oni ofte alfrontas alineon kun nur kelko da vortoj. La plia simpleco de la romaneto eble spegulas la evoluadon de la aŭtoro al pli simpla stilo. Eble la diferencojn rezultigas plie tio ol la malsameco de la tradukintoj. Sed ĉe la pli fruaj verkoj — kiel ofte ĉe la aliaj Johansson-tradukoj — oni povas dum legado imagi svedan lingvoritmon. Tio ne okazas ĉe la Nilsson-laboro. Ĉu temas pri malsamaj tradukintoj, ĉu pri malsamaj medioj, ne estas certe sen rekta aliro al la svedlingvaj originaloj.

Reginald Jaderstrom (Usono)

Laste aperis



Al lingva demokratio. Towards Linguistic Democracy. Vers la démocratie linguistique. *Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj. Prago, 20-23 julio 1996.* Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Rotterdam: UEA, 1998. 212p. ISBN 92 9017 054 9. 24cm. Vd. recenzi sur p. 72. 22,50 gld.

Brezhoneg... buan hag aes (1972). *La bretona lingvo... rapide kaj facile.* Per Denez. Esperantigis Merwen Runpaot. Ilustraĵoj de Nono. Rennes: Hor Yezh, 1997. 256p. ISBN 2 910699 22 6. 21cm. Simpla kaj metoda prezento de la lingvo, kun ekzercoj. 39,00 gld.

Dicionário Esperanto-português. A.S. Almeida (1928). [Lisboa]: Associação Portuguesa de Esperanto, 1997. 305p. ISBN 972 9471 32 0. 21cm. 33,00 gld.

Dicionário português-Esperanto. A.S. Almeida (1928). [Lisboa]: Associação Portuguesa de Esperanto, 1997. 535p. ISBN 972 9471 33 9. 21cm. Ĉ. 35000 kapvortoj. 54,00 gld.

Dum estas preskaŭ vespere. *Religiaj versaĵoj.* Leszek Łęgowski (1933). El la pola trad. Zofia Kamieniecka. Bydgoszcz: la aŭtoro, 1997. 55p. 21cm. 5,40 gld.

Elegioj. Tibulo (ĉ. 48-19 a. Kr.) El la latina trad. Gerrit Berveling. Breda: VoKo, 1998. 76p. 21cm. Ĉiuj poemoj de klasika aŭtoro, kies ĉefa temo estis amo. 10,80 gld.

En ĉiu homo vidu Dio-n. Bogusław Sobol (1935). Siedlec: Tajpo, 1997. 52p. 15cm. Kvindeko da piaj poemoj. 4,50 gld.

Der Esperantist 1(1965)-164(1990): Register. Teil I. Linde Knöschke / Ino Kolbe. Red. Detlev Blanke. Berlin: GILL, 1997. 117p. 30cm. Germanlingva. Diversfokusaĵoj indeksoj al ĉiuj jarkolektoj de la landa organo de orient-germanaj esperantistoj. 28,50 gld.

Esperanto. Lernilo krestomatia iom pli ol 200-vorta. A. Kerbel (1930). Ĥaĵo: la aŭtoro, 1998. 207p. 21cm. Ilus. Ringe bind. Kun facil-stila rerakonto de *Aelita* de Tolstoj kaj *Batalo por fajro* de Rosny. 15,00 gld.

Esperanto. Lernilo krestomatia iom pli ol 300-vorta. Kiel ĉi-supre. 203p. 15,00 gld.

Fulmotondro (1934). Cao Yu (1910-96). El la ĉina trad. Liu Caisheng. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1997. 135p. ISBN 7 5052 0343 6. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Kvarakta dramo pri la disfalo de familio, inspirita de Ibsen. 27,00 gld.

Gnomo, La. Gustavo A. Bécquer (1836-70). El la hispana trad. Wilhelm Theodor Oeste. Ascoli Piceno: Picena E-Centro, 1996. 17p. 20cm. Romantika novelo pri mistera fonto. 6,60 gld.

Hal (1913-17). Sigurdur Nordal. El la islanda trad. (1949) Wilhelm Theodor Oeste. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1996. 74p. 20cm. Poezia prozaĵo pri Donjuano, parto el pli granda verko. 13,20 gld.



Azia triopo: Per la tria volumo de *Ruĝdoma sonĝo* XIE Yuming kronis la plej grandan individuan traduk-entreprenon Esperantan (1893 paĝoj). Alispecan entreprenon gigantigis la koreo KIM Woo-Choong, estro de la firmao Daewoo, kiu aŭtoris *Vastas la mondo...* La viglon de Ĉina E-Eldonejo atestas la dramvolumo *Sunleviĝo*, kun sia ĝemelo (ne surbilde) *Fulmotondro*.

Kiel ŝtalo estis hardata (1934). Nikolaj Ostrovskij (1904-36). El la rusa trad. Solomon Iljiĉ Cins. Jekaterinburg: Sezonoj, 1997. 367p. 21cm. Bind. Fama romano soveta, de aŭtobiografia inspiro: Malgraŭ turmenta malsano, heroo Korĉagin verkas libron por helpi sian popolon. 30,00 gld.

Leteroj el mia muelejo (1866). *Kvar elektitaj pecoj.* Alphonse Daudet (1840-97). El la franca trad. Wilhelm Theodor Oeste. Ascoli Piceno: Gabrielli, 1996. 41p. 20cm. Viglaj rakontoj pri kamparana vivo. 13,20 gld.

Ne tiel, sed tiel ĉi! Konsilaro pri stilo (1965). F. Faulhaber. Beauville: SAT-Broŝurservo, 1996. 63p. 21cm. Klasika konsilaro pri la bela uzo de Esperanto. 6,00 gld.

Parolas veterano. L. Lentaigne (1909). Beauville: Amika E-Rondo, 1997. 24p. 21cm. Memoroj (1930-1995) pri esperantista vivo. 2,40 gld.

Ruĝdoma sonĝo. Volumo III. Gao E. El la ĉina trad. Xie Yuming. Beijing: Ĉina E-Eldonejo, 1997. 627p. ISBN 7 5052 0322 3. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Aŭtobiografia verko pri ruiniĝo de nobela familio kaj tragedio de junaj geamantoj. Laŭ komuna agnosko, la plej grava ĉina romano. 40 ĉapitroj verkitaj


de malsama aŭtoro ol volumoj 1 kaj 2, aperintaj en 1995 resp. 1996. 60,00 gld.

Somero cigana. Venelin Mitev. Red. William Auld. Sofio: la aŭtoro, 1993. 64p. 20cm. Trideko da poemoj de aŭtoro kiu "scias tiri arton el la emocioj kaj vivospertoj" ĉiutage (W. Auld). 9,00 gld.

Sukerfarado – sukerfariĵoj – sukerfarejoj. *Provo de klarigo kaj de faka terminaro.* Claude Longue-Épée (1931). Wintzenheim: TAKE, 1997. 51+9p. 30cm. Kun resumoj en sep lingvoj. 27,00 gld.

Sunleviĝo (1935). Cao Yu (1910-96). El la ĉina trad. Tan Xiuzhu. Pekino: Ĉina E-Eldonejo, 1997. 142p. ISBN 7 5052 0342 8. 21cm. Bind. Kromkovrilo. Kvarakta dramo kun amvendistino kiel heroino. 27,00 gld.

Tereza Desqueyroux (1927). François Mauriac (1885-1970). El la franca trad. Gérard Labasthe. Paris: UFE, 1998. 78p.



21cm. Psikologia romano pri virino mortiginta sian edzon. 13,50 gld.

365 tagoj el la Biblio en Esperanto. Kompilis Jerald T. Veit. Milwaukee: Kristana Inform-Centro, 1996. 43p. 22cm. Eliraĵoj el la Malnova kaj Nova Testamento, po unu por ĉiu tago. 4,50 gld.

Vastas la mondo, multas laboro (1989). Kim Woo-Choong (1936). El la korea trad. Choe Taesok. Seulo: Shin Cheon Ji, 1998. 219p. ISBN 89 85005 16 2. 22cm. Spertoj kaj konsiloj de la fondinto de la tutmonde sukcesa firmao Daewoo. La kompanio mem subvenciis la Esperantan eldonon. 18,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA,

Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 17,5% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5 gld. Antaŭdankon pro via mendo!



• Aŭstralio: Parado en Adelajdo

Aŭstralia E-Asocio elektis en sia ĝenerala kunveno (21-22 jan., Ipswich) novan estraron. Post la ekŝiĝoj de Kep Enderby kiel prezidanto kaj Alan Turvey kiel sekretario, nun prezidas Ron Gates (tutmonde konata kiel originala E-aŭtoro; vd. okt. '97, p. 177); vicprezidas Max Wearing kaj Jennifer Bishop; sekretario iĝis Neil Sills, memorata kiel agema kaj efika LKK-ano de la Adelajda UK.

En la Tago de Aŭstralio (26 jan.) granda parado buntis en la centro de Adelajdo: inter la marŝantoj, oni aplaudis ankaŭ la 12 esperantistojn marŝantajn kun verdaj flagoj. Ĉe la fina punkto de la parado, la urbocentra placo Victoria Square, atendis ekspozicio de esperantaĵoj, aranĝita de John Gallagher. Rigardinte ĝin, multaj starigis inteligentajn demandojn al la deĵorantoj. (*Esperanto sub la Suda Kruco*)

• Hispanio: Trezoro en Valencio

Dum la hispana civila milito malaperis la tuta biblioteko de la Valencio esperantista movado. Antaŭ nelonge la direktorino de la urba biblioteko informis la lokajn esperantistojn ke

tiuj libroj ne perdiĝis: ili dum multaj jaroj simple kasiĝis en la kelo. Pli ol 850 titoloj, de antaŭ la jaro 1936 (plej multaj el ili en ege bona stato), baldaŭ estos je la dispono de la bibliotekaj legantoj. La estroj de la biblioteko petis helpon de la lokaj esperantistoj por la katalogado, kaj Grupo Esperanto de Valencia havigis taŭgan personon por la tasko: Florentino Lozano. Jam estas pretaj la slipoj, kiujn la deĵorantoj de la biblioteko enkomputiligos. (A. Casquero)

Puerta Del Sol, aŭdkaseda magazino por lernantoj de la hispana, dediĉis ampleksan parton de sia numero 1997/3 al Esperanto. Estas aŭdeblaj intervjuoj kun poeto Miguel Fernández kaj kun Marcos Cruz (nome de Hispana Esperanto-Federacio), poemo de García Lorca kaj la kanto "Papago" de Ĵomart kaj Nataŝa. (Interredaktore)

peŝto. Trupo de aktoroj kaj dancistoj, varbitaj por la okazo, ludis la verkon du fojojn. Pliaj prezentoj sekvos se troviĝos teatro kiu pretas daŭre gastigi la spektaklon. En televida kulturprogramo informanta pri la evento oni diris (erare) ke la romano estis verkita de Szathmári unue en Esperanto. (K. Smidéliusz, *Magyar Narancs*)

• Japanio: Ĉeĥov sur filmo

Sep diversnaciaj esperantistoj vivantaj en Japanio preparas filmon, *En somera vilao*, laŭ la samtitola rakonto de Anton Ĉeĥov; scenariste helpas KITAGAWA Hisasi. (*La Revuo Orienta*)

• Norvegio: Rusa ĝemelo

Antaŭ 25 jaroj ĝemeliĝis la norvega urbo Vadsø (nur kelkdek kilometrojn okcidente de la limo kun Ruslando) kaj la rusa Murmansk. Esperantisto

• Francio: KoToPo

Necesas nur iom da helpo, financa aŭ manlabora, por ke malfermiĝu ĉi-printempe KoToPo: "mult-kultura ejo, informejo pri Esperanto, trinkejo internaciema" en centra kvartalo de la urbo Liono. (Sur la foto: renoviĝas la fasado de KoToPo.) Informas sekr. Guillaume Lanier (13 Montée Decourtray, FR-69005 Lyon, Francio; ☎+33/4/78-25-30-71; ✉kotopo@esperanto.org).



• Hungario: Kazohinio en teatro

Unuan fojon estis spektebla teatra adapto de la romano *Kazohinio* de Sándor Szathmári (vd. dec. '97, p. 202), la 25-an de februaro en Buda-

Ole Fredrik Jensen el Vadsø ricevis de la urbo 4000 kronojn (ĉ. 1100 gld.) subvencie al vojaĝo al Vadsø de la prezidanto de la Murmanska E-klubo, Aleksas Masjukas.

• Kongo: La kialoj de sindediĉo

"Kial vi dediĉas tiom da tempo kaj energio al la afero Esperanto?" — tiu estis la temo de konversacia rondo organizita de Agroturisma Esperantista Rondo kaj Verda Flago Esperanto-klubo la 7-an de februaro en Mbanza-Ngungu, en Demokratia Respubliko Kongo (eksa Zairio).

Enkonduke al la temo, sian ĝisnunan vidpunkton prezentis Ntoto Zola kaj la ĉefpreleganto Kizeyidioko Mayinda.

Evidente, la respondoj malsimilis unu la alian. Laŭ unuj, afrikanoj ankoraŭ ne dediĉas tempon "al la afero Esperanto" — kion aliaj vigle kontraŭis. La debatoj, kelkfoje akraj, ebligis al ĉiu malkovri grandajn utilojn de Esperanto.



De la 21-a ĝis la 23-a de aŭgusto okazos Barenca E-kongreseto en Tana, kunigonta E-aktivulojn el la limregiono de Norvegio, Finnlando, Rusio kaj Svedio. (*Norvega esperantisto*)

• Pollando: Informado multrimeda

De la 11-a de decembro ĝis la mezo de jan. daŭris ekspozicio dediĉita al la 110-a datreveno de Esperanto en Gliwice, en la Klubo de Internacia Gazetaro kaj Libro. Al la sama temo omaĝis poŝta stampo ekuzita la 15-an de dec. en loka poŝtoŝtanco. Uzadon de simila poŝta stampo en Zielona Góra aranĝis Antoni Beyga. (S. Mandrak)

Post vizito de ĵurnalisto Neil Bodler al Bjalistoko, aperis en februaro artikolo pri la urbo, pri Zamenhof kaj E-o en *Business Central Europe*, revuo por entreprenistoj. En la universitato de Bjalistoko, kadre de la Universitato de la Tria Aĝo, Jarosław Parzyszek prelegis la 12-an de marto pri Zamenhof al ĉ. 300 personoj. (A. Zejdlar)

• Svedio: Fondita de virino

La 4-an de aprilo la Esperanto-Klubo de Stokholmo festene solenis la 100-jaran datrevenon de sia unua fondiĝo. (La Ido-skismo siatempe profundigis la klubon, tiel ke ĝi devis refondiĝi post kelkaj jaroj.) La instigo fondi klubon venis de la esperantistino Maja Fornander, kiu artikole plendis (subskribante per "fraŭlino M. F.") en *Lingvo Internacia* (1898:1) pri manko de iniciatemo ĉe la viraj esperantistoj. Ŝi fariĝis mem unu el la klubestraranoj. (F. Luin)

Evidentiĝis diversaj stimuloj por lerni nian lingvon: unuflanke ĝia riĉoplena literaturo kaj la universala kulturo kiun ĝi peras, aliflanke la reto de internacia amikeco kaj solidareco kiun ĝi teksas. Verŝajne, kelkiuj venis al Esperanto nur pro scivolemo, sed enirinte Esperantujon ili malkovris la homaranismon kaj la pacismajn idealojn de Zamenhof.

La homaranismo de Esperanto celas interalie la kreadon de unu granda rondo familia. Ĉu post jarcento da ekzisto Esperanto jam helpas la homaron atingi tiun rondon familian? — La konversacia rondo traktis pluajn tiajn demandojn, sen atingi definitivan respondon. (Laŭ raporto de Ntoto Zola)



• Beletro: Konkurso por virinoj

Virinoj el mediteraneaj landoj konkurso per noveloj (5-10 p.) pri "Destinoj de virino". Sendu 3 ekz-ojn, en ajna lingvo, ĝis 30 nov., al: Forum Femmes Méditerranée, 24 rue Montgrand, FR-13006 Marseille, Francio. (R. Triolle)

• Universitato: Valencia premiero

Nur kromseĝoj ebligis akcepti ĉe Universitato de Valencio 60 studentojn por la unua hispania E-kurso kun oficiala studvaloro. Instruis Augusto Casquero. Prelegis inaŭgure prof. Antonio Alonso, kaj ferme, jam Esperante, poeto Miguel Fernández. (A. Casquero, Interredaktore)

• Turismo: Esperanta frazlibro

En la konata serio Lonely Planet eldoniĝis en aprilo pasintjara 544-paĝa frazlibro kun 13 eŭropaj lingvoj, i.a. Esperanto. Seán Ó Riain, kiu verkis la partojn en la irlanda kaj la kimra, en du monatoj da debatoj konvinkis la eldoniston enmeti ankaŭ Esperanton. Temas pri nuraj 8 paĝoj ĉe la fino, kun la 16 reguloj, kun argumentoj por Esperanto, kelkaj frazoj kaj parolreguloj, kaj la adresoj kun telefon-numeroj de la Esperanto-asocioj en okcidenta Eŭropo. Vendiĝas ĉirkaŭ 8 000 ekzempleroj de la libro jare. (S. Ó Riain)

• Verduloj: Dulingva solvo?

Antaŭvide al la kongreso en Parizo de 29 verdulaj partioj el 27 landoj en printempo 1999, la franca verdulo Charly Dumont prezentis jenan proponon de realisma aranĝo por instigi la efektivan uzon de Esperanto, lingvo principe favorata de la franca verdula partio "Les Verts": "1. La unua lingvo de la kongreso estos la angla 2. Tiuj kiuj ne volas paroli la anglan rajtas uzi sian gepatran lingvon, kun interpreto en Esperanton." (*Aveno*)

• Vortaroj: Pretas E-germana

Laŭ informo de la aŭtoro, prof. dr. Erich-Dieter Krause, lia 880-paĝa granda vortaro Esperanto-germana estas finita. Necesas nun trovi renomman eldonejon. (*Magdeburga Folio*)

• ZEO-j: Du novaj en Francio

Rondoplaco Doktoro Zamenhof estas inaŭgurita en Laon la 11-an de januaro, en ĉesto de sesdeko da esperantistoj kaj de urbestro Jean-Claude Lamant, kiu senvualigis la stratsildon kune kun Louis L. Zaleski-Zamenhof. UEA-vicprezidentino Renée Triolle



Foto kompleze de Augusto Casquero

kaj delegito Daniel Luez florkronis la sildon. Sekvis akcepto en la granda salono de la urbodomo. Kopio de 15-minuta videoregistraĵo pri la evento estas ricevebla, kontraŭ kostoj, de Daniel Luez (1, rue Victor-Faglain, FR-02000 Laon, Francio; dluez@francemultimedia.fr). Gratulmesaĝoj bonvenas al la urbestro: M. Jean-Claude Lamant, Hôtel de Ville, FR-02001 Laon Cedex. (*Norda Gazeto*)

Dum la 53-a Kongreso de SAT-Amikaro, en la okcident-franca urbo Saint-Brieuc estos inaŭgurita la 11-an de aprilo nova strato Zamenhof, kun paroladoj de la urbestro kaj de Denis-Serge Clopeau, pere de kies adreso ("Esperanto-22", 6 rue J.P. Calloc'h, FR-22000 Saint-Brieuc, Francio) gratulaj poŝtkartoj estas daŭre bonvenaj. (D.-S. Clopeau)

UK Ĝis la 20-a de marto al la Montpeliera UK (1-8 aŭg.) aliĝis 2217 personoj.

IZK Internacia Junulara Kongreso (Rijeka, Kroatio, 25 jul.- 1 aŭg.) instigis aliĝi, ĝis la fino de februaro, 140 gejunulojn el 22 landoj.

Per- sone



• Dang: Sin eksponi feliĉigas

Okaze de siaj 65-a naskiĝtago kaj 40-jara esperantisteco, DẶNG Dính Dám, fakdelegito en Hanojo, aranĝis komence de februaro Esperanto-eksponicion en sia propra loĝejo: 111 paneloj simbolis 111 jarojn de Esperanto. En tiuj “tri tagoj plej feliĉaj de lia Esperanto-vivo”, ne malpli ol 200 geamikoj kaj konatoj, plejparte neesperantistoj, faris viziton al DẶNG Dính Dám.

ANONCETOJ

Komencanto — utila kaj agrabla gazeto por komencantaj esperantistoj, komencantaj aŭtoroj kaj kursgvidantoj el la tuta mondo. 20 korespondadresoj ĉiunumero. RU-620041, Jekaterinburg-41, poŝtkesto 132, Ruslando.

La retloko de Esperanto-Societo Kebekia denove viziteblas. Venu malkovri Kebekion: <http://www3.sympatico.ca/esperanto/>.

• **Stead: Esperantisto sur Titaniko**
Sur Titaniko, la ŝipego sinkinta en 1912 (kaj revivigita ĉi-jare en Titane sukcesa Holivuda filmo), troviĝis almenaŭ unu pasaĝero esperantista: William Thomas Stead (1849-1912), kiu ne postvivis la katastrofon.

La brito Stead estis sukcesa kaj influa publicisto, kiu ne timis tuŝi tiklajn sociajn temojn kiel infanprostitucion. Sur Titaniko li vojaĝis al packonferenco Novjorka, invitive de la usona prezidento W. H. Taft. Kurioze, jam en 1886 Stead verkis artikolon pri katastrofo en Atlantiko de vaporŝipo kun malsufiĉaj savboatoj. Stead apogis Esperanton en sia gazeto *Review of Reviews*, kunfondis en sia propra oficejo la Londonan E-Klubon kaj membris en la preparkomitato de la 3-a UK en Kembrigo.



• Frank: Meritkruco por AIS-estro

65-jariĝinte la 19-an de feb., prof. d-ro Helmar Frank emeritiĝis post 35-jara universitata profesorado en Paderborn (Germanio). La 17-an de marto li ricevis la Federacian Meritkrucon Unuaklasan de la Merita Ordeno de Germanio pro sciencaj kaj homaj meritoj, i.a. pro la laboro en Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kiun li fondis, prezidas kaj — malgraŭ sia universitata emeritiĝo — plu gvidos dum la tria el ĝiaj senataj periodoj kvarjaraj. (R. Fössmeier, Interredaktore)


• Pauling: Infanaĝa esperantisto

La usona kemiisto Linus Carl Pauling (1901-1994), kiu en 1954 ricevis Nobel-premion pro esploroj pri la naturo de kemiaj ligoj, en sia infanaĝo okupiĝis pri Esperanto. Tion atestas letero kiun li sendis en 1991 al la usona Esperanto-aktivulo R. Kent Jones, permesante ke tiu dediĉu al li sian Esperantan tradukon de kemia lernolibro. Pauling asertis ke, lerninte Esperanton kiel 15-jarulo, post 75 jaroj li ankoraŭ senĝene ĝin legas. (R. Kent Jones)

La fenomeno Skorupski

Esperantlingva verko de Arthur Baur, *La fenomeno Svislando* aperis en 1979: ĝi klarigas al la mondo kiel Svislando funkcias. Pli ol jardekon poste Wojciech Usakiewicz tradukis ĝin en la polan (*Szwajcarski fenomen*), kaj ekde 1992 ĝis antaŭ nelonge vendiĝis 4500 el la eldonkvanto de 5000 ekzempleroj.

La konata pola Esperanto-poeto Jan Stanisław Skorupski, kiu vivas en Zuriko, trovis originalan uzon por la restanta duonmilo da volumoj. La nova dekstra registaro de Pollando volas enkonduki administraciajn reformojn, i.a. redukti la decidkampon de vojevodioj (distriktoj) kaj malmultigi ilian nombron. Skorupski havis la ideon ke la polaj parlamentanoj povus inspiriĝi, por siaj fervoraj debatoj, de la svisa ŝtatsistemo. Tial li aĉetis, en disaj



Jan Stanisław Skorupski

lokoj de Pollando, la restantan stokon de *Szwajcarski fenomen*, kaj helpe de parlamentano Gabriel Janowski disdonigis ĝin al ĉiuj deputitoj. La efiko estis tuja: tre baldaŭ la polaj amaskomunikiloj pleniĝis per aludoj al “la svisa fenomeno”, kaj legemuloj ekserĉis la titolon en librovendejoj — evidente, vane. Nur Skorupski gardas “strategian rezervon” de 90 pollingvaj ekzempleroj, dum la Libro servo de UEA ankoraŭ vendas la originalon Esperantan (je 12,00 gld.). (Laŭ *Tages-Anzeiger*)



Kun viaj kontribuoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin. Se vi fotas aŭ disponas pri fotoj, sendu ilin al nia redakcio kun indiko pri ilia aŭtoro. Freŝdataj portretoj de aktivaj esperantistoj aparte bonvenas. Koran dankon!

La membraro de UEA en 1997

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume	LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO		
Albanio	0	19	19	Latvio	66	19	85	Kategorio	1996	1997
Alĝerio	0	2	2	Libano	0	1	1			
Angolo	0	4	4	Libio	0	1	1			
Argentino	93	68	161	Lihtenŝtejno	0	1	1			
Armenio	20	15	35	Litovio	78	27	105	Membro-Gvidlibro	404	452
Aŭstralio	112	79	191	Luksemburgio	93	12	105	Membro-Jarlibro	1663	1334
Aŭstrio	31	54	85	Madagaskaro	15	10	25	Membro-Abonanto	3431	3498
Azerbajĝano	0	1	1	Makedonio	45	13	58	Juna Membro-Jarlibro	550	598
Bangladeŝo	0	1	1	Malajzio	0	1	1	Juna Membro-Abonanto	274	277
Barejno	0	1	1	Malto	37	3	40	Dumviva Membro	874	867
Belgio	579	177	756	Maroko	0	1	1	Juna Dumviva Membro	19	17
Belizo	0	1	1	Meksiko	20	13	33	Honora Membro	58	58
Benino	0	7	7	Moldavio	0	3	3	Honora Patrono	11	12
Bjlorusio	0	17	17	Mongolio	0	4	4	Individuaj Membroj		
Bolivio	0	5	5	Nederlando	365	365	730		7284	7113
Bosnio-Hercegovino	30	45	75	Nepalo	0	10	10	Aligitaj membroj	10865	10523
Brazilo	178	525	703	Niĝerio	0	24	24	Junaj aligitaj membroj	2449	2495
Britio	603	249	852	Nikaragvo	0	4	4	Membroj entute		
Bulgario	140	57	197	Norvegio	303	72	375		20598	20131
Ĉeĥio	188	111	299	Nov-Zelando	38	34	72	Societo Zamenhof	250	242
Ĉilio	25	4	29	Pakistano	50	25	75	Abonoj Esperanto	191	205
Ĉinio	981	190	1171	Panamo	0	2	2	Kolektivaj ab. Eo	75	61
Danio	156	92	248	Papua Novgvineo	0	2	2	Abonoj Kontakto	439	443
Ebura Bordo	25	3	28	Paragvajo	0	1	1	Kolektivaj ab. Kto	606	602
Egiptio	0	4	4	Peruo	25	4	29	Patronojo de TEJO	108	101
Ekvadoro	0	2	2	Pollando	100	118	218	Dumvivaj Patr. de TEJO	11	12
Estonio	40	39	79	Portoriko	0	2	2	Kotizoj entute		
Filipinoj	0	4	4	Portugalia	271	19	290		22278	21797
Finnlando	252	268	520	Ruando	0	1	1	Malkresko de la nombro de indivi- duaj membroj (IM) en 1997 estis antaŭvidebla pro malpli granda Univer- sala Kongreso. El la kongresanoj de 1996 ne remembris pasintjare 475, influante grandparte la perdon en la kategorio Membro kun Jarlibro. Pro kresko en aliaj kategorioj, la entuta nombro de IM reduktiĝis tamen je nur 171, superante tiel por la deknua sinsekva jaro la limon de 7000. Pli da membroj en pli multekostaj kategorioj plialtigis la kotizajn enspezojn je pli ol 5000 guldenoj. Aparte granda IJK kaŭzis la aliĝon de pli granda nombro da junaj membroj (+6,2%).		
Francio	449	660	1109	Rumanio	100	56	156			
Ganao	0	5	5	Rusio	113	228	341	Iom signifie kreskis la membraro en Italio (+31) kaj Irano (+23; ĉi tie ekaktivis nova peranto), dum grandajn perdojn registris Francio (-41) kaj Pol- lando (-73), sendanto de multaj kon- gresanoj al ĉiu UK en Eŭropo.		
Germanio	1021	626	1647	Salvadoro	0	1	1			
Greklando	267	21	288	San-Marino	0	1	1	Plu falis la nombro de aligitaj membroj (AM) en Bulgario (-446, 76%), kie gravaj ekonomiaj problemoj bremsas la movadan aktivadon. Kresko en aliaj landoj tamen limigis la nega- tivan diferencon de la jarfina sumo de AM al nur 296.		
Gvatemalo	0	9	9	Saŭda Arabio	0	1	1			
Haitio	15	1	16	Senegalio	0	9	9	p _z		
Hinda Unio	100	19	119	Sirio	0	1	1			
Hispanio	383	173	556	Slovakio	0	43	43			
Hungario	447	119	566	Slovenio	101	27	128			
Indonezio	0	4	4	Srilanko	0	4	4			
Irano	35	81	116	Sud-Afriko	40	10	50			
Irlando	50	16	66	Svazilando	0	1	1			
Islando	46	37	83	Svedio	766	252	1018			
Israelo	174	71	245	Svislando	83	138	221			
Italio	958	300	1258	Taĝikio	0	4	4			
Japanio	1109	408	1517	Tajlando	0	1	1			
Jugoslavio	204	69	273	Tanzanio	0	4	4			
Kamboĝo	0	2	2	Togolando	25	34	59			
Kamerunio	0	7	7	Tunizio	0	2	2			
Kanado	154	79	233	Turkio	0	5	5			
Kartvelio	0	4	4	Ugando	0	1	1			
Kazaĥio	0	7	7	Ukrainio	106	41	147			
Kenjo	0	2	2	Urugvajo	30	7	37			
Kolombio	50	19	69	Usono	562	399	961			
Kongo, Dem. Resp.	50	14	64	Uzbekio	0	6	6			
Kongo, Pop. Resp.	0	2	2	Venezuelo	8	17	25			
Korea Resp.	213	66	279	Vjetnamio	100	29	129			
Kostariko	0	6	6	Zimbabvo	0	1	1			
Kroatio	200	86	286							
Kubo	100	40	140							
Kuvajto	0	1	1	117 landoj	13018	7113	20131			

Nekrologoj

MIJOŖI Ŝimeko (1911-1998) forpasis la 24-an de februaro en Ŝirotori (Japanio). Ŝi prezidis inter 1986 kaj 1990 Oomoto-Amikaron de Esperanto, kiu i.a. fincas la Premion Onisaburo Deguĉi ekde 1987. Ŝia filo MIJOŖI Ecuo estas la konata movada patrono financanta la ĉiujare aljuĝatan Subvencion Cigno.

Nora MOERBEEK-BARTELS (1930-1998), dumviva membro, delegito pri blindulaj aferoj kaj E-instruado, mecenato de ĉinaj esperantistoj, forpasis la 17-an de marto en Beverwijk (Nederlando). Tre aktiva en la blindula medio e-ista, ŝi estis sekretario en la 70-aj jaroj de NOSOBE, la nederlanda societo de e-istaj vidhandikapitoj, kasisito (1983-89) kaj sekretario (1992-98) de Ligo Internacia de Blindaj E-istoj, redaktoro de ties revuo *Esperanta Ligilo*. Ŝi prezidis Tutmondan Asocion de E-istaj Nefumantoj kaj estis honora membro de Asocio de E-istaj Handikapuloj. Ŝi tradukis la popularajn *Anne Frank ne estas de hieraŭ* (1988) kaj *Taglibro de Anne Frank* (1997) kaj, en la nederlandan, la romanon *Sur kampo*

estis filo de Henryk Zamenhof (frato de la iniciatinto de nia lingvo). Juna inĝeniero, en 1939 li venis al Usono por viziti la mondan ekspozicion, kaj la eksplodo de la mondmilito trudis al li resti surloke. Li rekomencis siajn studojn, ĉi-foje pri biologio, kaj el lia specialigo pri biokemio rezultis invito okupi profesoran postenon ĉe la prestiĝa universitato UCLA en Los-Anĝeleso. Per siaj esploroj tie — specife pri la evoluo de la cerbo antaŭ la naskigo



Foto: François Veuthey

granita de I. Nemere (*Op een veld van graniet*, 1997). En 1996 ŝi ricevis la kvinan gradon de la ordeno Oranje-Nassau pro sia Esperanto-agado (vd. jul.-aŭg. '96, p. 127).

TAKASE Yosiko (1934-1997), e-isto duonan jarcenton, forpasis la 13-an de oktobro. Ŝi deĵoris sekretarieje de Japania E-Instituto kaj lastatempe administris la E-domon en Yatugatake.

D-ro Stephen ZAMENHOF (1911-1998) — nevo de L.L. Zamenhof, kiun li ankoraŭ persone konis — forpasis la 4-an de februaro en Los-Anĝeleso. Li

— kaj per siaj multnombraj sciencaj publikigaĵoj li atingis mondskanal koonatecon.

Stephen Zamenhof bone regis Esperanton kaj tutkore simpatiis al ĝia interna ideo. Li estis membro de la Honora Komitato de la 57-a Universala Kongreso (Portland, 1972) kaj verkis tiam fakan recenzon por nia revuo.

OFICIALA INFORMILO

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Kanado: Peter Hansen. Svislando: Martin Ecot. Usono: Rubén Feldman-González.

DONACOJ 1998 (NLG)

ĝis la 28-a de februaro

Fondaĵo Afriko: Usono: H. Tonkin 204,90. Sumo ĉi-jara 2608,20.

Fondaĵo Ameriko: Usono: L. Harmon 50,50. Sumo ĉi-jara 94,34.

Fondaĵo Azio: Japanio: H. Abe 65,14; Esperanto-Densysusyo Sue 32,57; K. Hayasi 32,57; M. Hirota 32,57; A. Hosida 32,57; I. Katou 32,57; H. Kuriyama 32,57; Y. Maeda 32,57; Y. Mizuno 32,57; N. Nisimura 32,57; H. Onda 32,57; Y. Oosaki 32,57; Y. Sasaki 32,57; Y. Sawaya 32,57; T. Takeuti 65,14; S. Yamazoe 32,57. Sumo ĉi-jara 586,26.

Fondaĵo Canuto: Francio: S. Amariglio 33,63; R. Cuenot 10,09; R. Despujols 100,89; J. Ducrocq 336,30; R. Gonin 100,00; C. Haren 40,35; E. Thiollière 33,63. Nederlando: A.W. Treurniet 103,00. Svislando: S. Kaufmann 16,44; C. Sixtus-Pot 30,14; E. Walder 52,06. Sumo ĉi-jara 973,54.

Ĝenerala Kaso: Britio: R.C. Hoather 59,94. Nederlando: G.F. Makkink 794,00. Kanado: W.D.B. Hackett 34,94. Svislando: D. Bühlmann 137,00; J.-N. Friot 26,03; R. Heer 30,14; E. Jayet 5,48; W. Laederach 10,96; F. Liechti 12,33; E. Quaglia 4,11; J. Tomaszczyk 9,59. Sumo ĉi-jara 1382,34.

Kampanjo 2000: Belgio: E. Ernst 1000,00. Korea Resp.: Sung Ho Cho 100,00. Sumo ĉi-jara 1100,00.

Junulara Fondaĵo: Kanado: M. McCall 12,58. Sumo ĉi-jara 122,58.

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Britio: R. Lynn 23,62. Germanio: E. Blasius 25,00; W.M. Schwarz 9,45; B. Wollenberg 4,72. Sumo ĉi-jara 62,79.

Volontula Fondaĵo: Germanio: E. Blasius 25,00; W.M. Schwarz 9,45. Francio: S. Amariglio 33,63; R. Despujols 33,63; J. Ducrocq 168,15; Irlando: M. Mullarney 47,25. Nederlando: A. van Gelder 15,00. Norvegio: E. Matland 27,00. Sumo ĉi-jara 458,11.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Estraro de UEA

Prezidanto (kunordigo, eksteraj rilatoj): prof. Lee Chong-Yeong, Shinsegae Town Apt. 5-1001, Soosung-Dong, Taegu 706-031, Korea Respubliko; ☎ +82-53-765-0880 [h], +82-53-652-4488 [of]; ✉ +82-53-652-8141 [of], +82-53-765-0881 [h]; ☐ lee@esperanto.net

Vicprezidanto (landa agado: Okcidenta Eŭropo, Ameriko, Afriko; edukado, kulturo): s-ino Renée Triolle, 4, impasse des Charpentiers, FR-57100 Thionville, Francio.

Ĝenerala Sekretario: s-ino Michela Lipari, viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; ☎ +39-6-39-72-61-98; ✉ +39-6-39-72-61-69; ☐ mc8750@mcclink.it.

Estrarano (financo, administrado): d-ro Fred de Geus, Kerkhoflaan 9, NL-7913 VV Hollandscheveld, Nederlando; ☎ +31-528-341214 [h], +31-50-3613769 [of]; ✉ +31-50-3613763 [of]; ☐ A.F.de.Geus@anest.azg.nl.

Estrarano (eksteraj rilatoj, CED): s-ro Mark Fettes, 158-A Henderson Ave., Ottawa, Ont., Kanado K1N 7P6; ☎ +1-613-565-9282; ✉ +1-613-565-9279; ☐ mfettes@magi.com.

Estrarano (landa agado: Orienta Eŭropo, Azio, Oceanio): s-ro Povilas Jegorovas, ab.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio; ☎ +370-7-739776 [h], +370-7-209781 [of]; ✉ +370-7-228616 [of].

Estrarano (faka kaj scienca agado; lingvo): prof. Amri Wandel, 767 Makabim, IL-71908 Israelo; ☎ +972-8-264462 [h], +972-2-658-6860 [of]; ✉ +972-2-658-4437 [of]; ☐ amri@vms.huji.ac.il.

Komitato de UEA: Jarlibro 1997 enhavas liston de ĉiuj komitatanoj (vd. p. 15-19).

Andrew O. Urevbu

Kulturo kaj teknologio



UEA

INTERESKAPTA LIBRO DE UNESKO EN ESPERANTO!

KULTURO KAJ TEKNOLOGIO. Studo pri la jara temo por 1997 de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo. Andrew O. Urevbu. Trad. Johano Rapley. Rotterdam: UEA, 1997. 64p. ISBN 92 9017 053 0. 21 cm. Prezo: 15,00 gld.

Analizo pri la rilato inter kulturo kaj teknologio. Kiel efikas kulturo sur teknologiajn evoluon? Ĉu kultura evoluo stimulas teknologiajn ŝanĝon? Ĉu teknologio estas kulture neŭtrala? Kiaj teknologioj taŭgas por evolulandoj? Post ĝenerala studo de tiu problemaro la aŭtoro traktas aparte la historiajn spertojn de Japanio, Germanio, Britio, Francio, Usono, Sovetio, Afriko kaj Ĉinio.

E. A. EKKER / D. EISENBURGER:

Franz Schubert Muzika albumo

Bela, bindita, plenkolora
ilustrita 28-paĝa libro,
plus 60-minuta kompaktdisko.

Eldonejo KLEKS, 1997. Prezo: 54,00
gld. Nur libro (sen disko): 30,00 gld.
Triona rabato ĉe UEA ekde 3 ekz.



Por esti ĝisdata pri la
evoluo kaj faka literaturo
de interlingvistiko kaj
esperantologio

INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Jara abono (tri n-roj po 16p.) 10 gld.; EU-landoj 10,60 gld. Abonu ĉe UEA.



En 1997 242 esperantistoj subtenis
la agadon de UEA per aliĝo al

Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de
mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la
prezidanto de UEA, inviton al akcepto en
UK kaj donaceton kun la Jarlibro,
kiu en 1997 estis bela SZ-ŝlosilujo.
La kotizon (duoblo de MA por via
lando) vi povas pagi al via peranto
aŭ rekte al UEA.



FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu **patrono de TEJO**

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas
la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭkazajn servojn kaj publikigaĵojn.

RIKOLTO DE 50 JAROJ

FURORE!

PAJLEROJ KAJ STOPLOJ. Elektitaj prozaĵoj.
William Auld. Rotterdam: UEA, 1997. 348p.
ISBN 92 9017 052 2. 21cm. Prezo: 42,00 gld.

"La jaro 1997 signas la 50-jariĝon de mia serioza verkado en Esperanto. La ĉefa rikolto de tiu verkado estas la kvindekda de miaj libroj (ankoraŭ plimultiĝonta) sur breto en mia biblioteko. Sed post ĉiu rikoltado postrestas surkampe pajleroj kaj stoploj, kiujn oni kutime forbalaas aŭ surtretas. — Mi do decidis kolekti libroforme tekstojn miajn, kiuj ŝajne havas valoron pli ol nur efemeran, kaj jen la rezulto. Ekzemple, dum mia vivo mi verkis verŝajne centojn da librocenzoj; la plimultaj estas sufiĉe rutinaj, sed de tempo al tempo mi pliprofondiĝis en la koncerna afero, kaj la rezultinta recenzo eble kontribuas al nia literaturesplora laboro. Tiajn do mi decidis 'savi'." (William Auld)

La libro estas aranĝita en kvar sekcioj: Eseoj, Rakontoj, Tradukoj, Libro-kulturo. Juvelo de la eldona rikolto ĉi-jara!

william auld

pajleroj

kaj stoploj

elektitaj prozaĵoj

universala esperanto-asocio

Edward Symoens:

BIBLIOGRAFIO DE DISERTACIOJ PRI ESPERANTO KAJ INTERLINGVISTIKO



*Tiu ĉi grava informfonto (1989; 159p.)
estas nun ĝisdatigita per 63-paĝa
suplemento. Kune ili priskribas
preskaŭ 250 universitatajn studojn.*

Baza libro 21,00 gld.; suplemento 7,20 gld. *Oferto:* Ambaŭ kune 23,50 gld.

Ankaŭ vi povas kontribui!

Fondaĵo Ameriko



helpas al la Esperanto-movado en Centra kaj Suda
Ameriko. Vian donacon vi povas sendi pere de la
kotizperanto en via lando aŭ rekte al UEA. Dankon!

Cent jaroj (1896-1996) da
stratoj, placoj, monumentoj,
bustoj, kulturcentroj,
tabuloj, parkoj, pontoj,
asteroidoj en unu libro

HUGO RÖLLINGER

Monumente pri Esperanto

Redaktis Thomas Bormann. Rotterdam:
UEA, 1997. 111p. 86 fotoj kaj pluraj tabe-
loj. ISBN 92 9017 051 4. 24cm. Prezo:
18,00 gld. (Triona rabato ekde 3 ekz.)



Fondaĵo Canuto

*Multaj arde deziras membriĝi
en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via
donaco al Fondaĵo Canuto helpas
nin teni la kontaktojn kun tiuj,
kiuj suferas pro transpagaj baroj.
Antaŭdankon pro via solidareco!*

Transpontu la atendon

*Jam temp' está
pensi
pri la UK...*

MONTPELLIER
01 - 08
aŭgusto
1998



83-a Universala Kongreso
de Esperanto

kaj glufermi viajn kovertojn per la nova kongresa glumarko.
51x34mm. Blua-flava-verda. Folio kun 32 markoj: 7,50 gld.
Triona rabato ekde 3 ekz.

SIMPLE LA PLEJ BONA!

SESA ELDONO
DE LA
INTERNACIA
LERNOLIBRO



Rotterdam: UEA, 1996. 234p. Prezo: 24,00 gld.
Sonkasedo: 12,00 gld. Triona rabato ekde 3 ekz.

Language Problems & Language Planning

Journal of the Center for Research and
Documentation of World Language Problems

La problemoj. La solvoj.
La rolo de planado
en la homa komunikado.
Kaj la kontribuo de Esperanto.

Redaktas: Probal Daŝgupto,
Marc van Oostendorp, Humphrey Tonkin
Eldonas: John Benjamins, P.O. Box 52519,
Amsteldijk 44, NL-1007 HA Amsterdam.

Aperas trifoje jare.
Individua abono: 92,00 gld.
Institucia abono: 185,00 gld.

Abonu pere de la Libroservo de UEA.